

majo 1970
63-a jaro
n-ro 774 (5)

esperanto

oficiala organo de
universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 - rotterdam-3002 - nederlando - redaktoro: v. sadler



Ernfrid Malmgren (1899-1970)

Vi trovos

bonvenajn novaĵojn inter la decidoj de la aprila kunsido de la Estraro de UEA, raportitaj sur paĝo 70. La provizora redukto de la paĝnombro de la revuo "Esperanto" en la lastaj kelkaj jaroj signifis, ke ofte necesis preterlasi aŭ longe prokrasti la aperigon de valoraj artikoloj kaj aranĝi la materialon sur la paĝoj en la plej ekonomia, sed ne ĉiam la plej bela maniero. Kelkfoje okazis, ke la konstantaj rubrikoj — recenzoj, oficialaj informoj, radio-elsendoj ktp. — apenaŭ lasis lokon por unu-du apartaj artikoloj. La decido reampleksigi la revuon ĝis 24 paĝoj monate donas al viaj redaktoroj eblecon plani varian kaj ekvilibrantan enhavon. Viaj kritikoj, sugestoj kaj rimarkoj estos ĉiam bonvena kaj necesa helpo por tiu celo. Leteroj por eventuala publikigo estu prefere tajpitaj sur aparta papero kun akompana noto permesanta aperigon.

Enhavo

- 69 Memore al Ernfrid Malmgren, honora prezidanto de UEA
- 70 Pli ampleksa revuo en 1971 — decidoj de la Estrara Kunsido
- 71 Unua plena TV-kurso en Esperanto
- 72 Nekonataj opinioj de Komensky (Novobilsky)
- 75 Informejo
- 76 Ĉu la afrikansa superus Esperanton? (De Kock)
- 77 Siberiaj simpatioj (Wermelinger)
- 78 Informado en la praktiko (Bakker)
- 79 Li varbis 13 dumvivajn membrojn! (intervjuo)
- 80 Kiel atingi vastan publikon (Antverpen-ano)
- 81 Recenzoj
- 81 Letero de leganto
- 81 Laste aperis ... (novaj eldonadoj)
- 82 Loke - Fake - Persono (mallongaj novaĵoj)
- 82 Informoj de CED
- 83 Esperanto uzata dum 20 jaroj — Hispana Radio-stacio
- 84 TEJO en Afriko (TEJO-novaĵoj)
- 85 55a Universala Kongreso, Vieno, 1970
- 86 Kalendaro
- 86 Oficiala informilo n-ro 434: novaj landaj oficuloj
- 86 Oficiala komunikado de la Akademio
- 88 Anoncetoj
- 88 Ne kostas multe

La kovrilo

Ernfrid Malmgren, honora prezidanto de UEA de post 1962, mortis la 28a de marto 1970. En la sama tago forpasis ankaŭ lia edzino Linnea. En la apuda artikolo la prezidanto de UEA reliefigas la kontribuojn de Ernfrid Malmgren al la movado kaj aldonas siajn pli personajn rememorojn pri unu el la plej ŝatataj personoj en la historio de Esperanto.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Ned. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo"

Aperas monate (escepte de aŭg.)

Abonprezo por unu kalendara jaro 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭstralio kaj Nov-Zelando 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Israelo 2,75.

Anonc-tarifo: 1 paĝo = 285 gld.; 1/2 p. = 150 gld.; 1/4 p. = 85 gld.; 1/8 p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝokostoj ekstreme. Ripet-rabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-3006.

Legantoj en 87 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Brit. Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hållabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj lernejoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, Germanujo. Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: S-ro U. J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: S-ro J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris (17e), Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonadoj: S-ro J. Uŝpienski, p/a PEA, ul. Jasna 6, Warszawa 1, Polujo.

Estrarano pri financoj kaj administrado: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Ned.

MEMORE AL ERNFRID MALMGREN

Honora Prezidanto de UEA

Informo en la ĉefurba gazeto "Svenska Dagbladet" sciigis la tristan eventon: Enfrid Malmgren, Honora Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, kaj lia alte ŝatata edzino Linnea forpasis la saman tagon, la 28-an de marto. La sorto volis, ke tiu admirinda paro, kunligita dum la vivo per sennombraj fadenoj de amo, kamaradeco kaj kunlaboro, kune forlasu tiun ĉi mondon kaj evitigu unu al la alia la doloron de soleca postresto. La malapero de Ernfrid kaj Linnea estas doloriga bato por ĉiuj, kiuj havis la privilegion rilati kun ili, ekde intimaj geamikoj ĝis malproksimaj gekonatoj. Por la Esperanto-Movado, krome, ĝi signifas perdon de unu el la plej raciaj, sindonaj kaj senŝancele firmaj agantoj por la Internacia Lingvo.

Ernfrid Malmgren naskiĝis la 3-an de novembro 1899 en Köping, Svedlando. Laŭ profesio li estis instruisto kaj, ĝis sia emeritiĝo, oficis ĉefe en Stockholm. Kiel pedagogo li ĝuis rimarkindan respekton ne nur inter samfakuloj, sed ankaŭ ĝenerale en la edukaj medioj. Aldone al senlaca energio, tiu prestiĝa reputacio certe helpis lin en la sukcesa laboro por Esperanto.

Li estis granda amanto de literaturo, ŝatis ĉiujn artobranĉojn kaj mem aktive okupiĝis pri pentrado. En 1956 mi vizitis por la unua fojo la apartamenton de geamikoj Malmgren en unu el la plej supraj etaĝoj de tre alta domo. Estis serena tago kaj de tie oni povis rigarde ĉirkaŭpreni preskaŭ la tutan urbon. Post la regalo li kondukis min al sia ateliero. Troviĝis tie pejzaĝoj, portretoj, animaloj . . . , preskaŭ ĉio el dalmata marbordo en Jugoslavio. Mi estis ravita. Kvankam pentritaj de amato, pluraj el la tolaĵoj estis elstare valoraj. "Prenu kiun ajn vi deziras el via naskiĝregiono por via nova hejmo" — li diris. Du el la pentraĵoj aparte impresis min: rompita, forlasita, tute izolita boato sur flaveta sablo; malplena, sed suna vilaĝstrato kun blankaj dometoj kaj ruĝaj tegmentoj. Post momenta hezito mi elektis la sunon. Survoje hejmen, ĉe ĉiuj landlimoj la doganistoj volis scii, kio troviĝas en la granda pakaĵo. Mi certigis, ke estas pentraĵo ne de Rembrandt, sed de amiko, donacita. Ili kredis kaj ne malfermis. Nun ĝi estas en mia hejmo en la sama loko, kien ĝi estis metita en 1956. Emocie ĝi estas por mi pli valora, ol ia verko de la granda pentristo.

Agado por la instruado

Malmgren lernis la Internacian Lingvon jam en la 20-aj jaroj kaj baldaŭ komencis agadi unuavice sur la kampo de instruado. Li organizis multajn kursojn, parte kun la helpo de eksterlandaj instruistoj. En 1930 li fariĝis membro kaj, iom poste, sekretario-kasisto de la Direkcio de la Sveda Esperanto-Instituto, kies ĉefaj taskoj rilatas al instruado, inkluzive ekzamenojn. Paralele, E. Malmgren aktivis en la Sveda Instruista Esperanto-

Federacio kaj grave kontribuis al organizo de oficialaj, ŝtate subvenciitaj kursoj de Esperanto por svedaj geinstruistoj. En 1932 aperis la bonega lernolibro "Sistema Kurso de Esperanto", kiun li verkis kun H. Seppik, kaj kiu atingis 8 svedajn eldonojn. En 1956 li prilaboris novan, pli modernan, lernolibron "Ĉies Dua Lingvo — Esperanto". Ĝi estis publikigita en 1957 kiel studmaterialo de radio-kurso, al kiu Malmgren dediĉis multe da tempo kaj talento. Li estis ankaŭ la iniciatinto kaj poste prezidanto de la Kontrolkomisiono de Lernolibroj. Dum kelka tempo li estis komisiito de UEA por "Esperanto kiel Baza Lingvo". Tiu ideo, en iom alia formo, baldaŭ realiĝos.

La dua granda agadkampo de Malmgren estis la organiza laboro, unue en la Sveda Esperanto-Movado kaj poste en la monda.

Sveda Esperanto-Federacio elektis lin sekretario en 1931. Inter 1945 kaj 1948 li estis ĝia prezidanto. Por la Sveda Esperanto-Movado Malmgren faris netakseble valorajn servojn. Komprenante bone, ke la progresado de la Esperanto-Movado multilate dependas de la bazaj organizaĵoj, li aparte studis tiun demandon kaj en 1933 publikigis "La Esperanto-Klubo" kun utilaj proponoj kaj sugestoj por plifortigo de la lokaj organizaĵoj kaj vigligo de ilia interna vivo. Plue, li organizis apartan turisman komisionon kaj aranĝis plurajn turismajn vojaĝojn. Ĉie sentiĝis lia gvida organiza talento: aranĝado de kursoj, prelegvojaĝoj, jaraj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj. En 1934, en sia funkcio de ĝenerala sekretario de la LKK, li plenumis la plejmulton de organizaj taskoj por la 26-a Universala Kongreso de Esperanto en Stockholm.

En la monda movado

Jam pli frue Malmgren partoprenis diversajn universalajn kongresojn kaj akiris spertojn rilate la mondan Esperanto-Movadon. En 1934, dum la U.K. en Stockholm, la gvidantoj de UEA estis ŝanĝitaj. Generalo Bastien fariĝis prezidanto, kaj E. Malmgren eniris en la Estraron. Li restis en ĝi seninterrompe ĝis 1956 kaj partoprenis plej aktive en la gvidado de la Asocio kaj en ĉiuj decidaj eventoj. La unua okazis jam en 1936, kiam, pro la tiama katastrofa financa situacio, estis necese translokigi la sidejon de UEA al Heronsgate. Pro la konataj protestoj kaj eĉ kortuma proceso, iniciatita de vere sensignifa malplimulto, en septembro 1936, estis fondita Internacia Esperanto-Ligo kun Generalo L. Bastien kiel prezidanto. La Estraro konsistis nur el 4 membroj, el kiuj unu estis E. Malmgren. En 1938, dum la Londona Kongreso, estis elektita nova Estraro de IEL kun Generalo Bastien kiel prezidanto kaj E. Malmgren kiel vicprezidanto. En la Estraro troviĝis ankaŭ d-ro P. Kempeneers, s-ro A. C. Oliver kaj la subskribinto. Nur tiam mi havis la okazon persone konatiĝi kun E. Malmgren. Komenciĝis ĉiam pli intima kunlaborado kiu transformiĝis en profundan personan amikecon. La Dua Mondmilito interrompis preskaŭ ĉiujn rilatojn inter la Esperanto-organizaĵoj, iliaj gvidantoj, komitatanoj kaj estraranoj. Multaj landaj asocioj kaj lokaj grupoj ĉesis funkcii, aliaj komplete malaperis. E. Malmgren kaj la tiama ĝenerala sekretario s-ro C. C. Goldsmith, ĉefo de la C.O., maksimume streĉis siajn fortojn por plue vivteni la Ligon. Eĉ dum tiu

La revuo "Esperanto" estos denove pli ampleksa ekde 1971. Ankaŭ la Jarlibro estos pli kompleta, kun detala librolisto pli ol 200-paĝa.

Tiuj, por la membraro de UEA, sendube estas la plej interesaj decidoj de la kunsido de la Estraro de la Asocio okazinta de la 3a ĝis la 5a de aprilo en la Centra Oficejo en Rotterdam. Reampleksigi la revuon "Esperanto" signifas ebligi pli varian kaj ekvilibrantan enhavon kaj firmigi la ĉiumonatan kontakton inter la unuopaj membroj kaj la tutmonda movado. Ampleksigi la Libroliston (ĉiun iom gravan libro-titolon sekvas kelklinia priskribo) signifas ne nur injekti stimulilon en la Esperantan libro-merkaton sed doni al ĉiuj, precipe al la izolitaj legantoj, eblecon detale informiĝi pri la nuntempe akirebla literaturo. La nova listo estos verŝajne la plej detala de tiu speco iam aperinta en Esperanto.

Unua plena kunsido de nova Estraro

La decidoj plej interesaj ne estas ĉiam tiuj, kies diskuto postulas plej multe da tempo. La Estrara Kunsido en Rotterdam daŭris tri tagojn kaj pri-traktis financon, la membraron, administradon, la junularan sekcion, eldonaĵojn, la Universalajn Kongresojn en Vieno, Londono kaj Portland, informadon, lernejojn kaj amason da aliaj unuopaj temoj. Ĉeestis ĉiuj ok estraranoj, la direktoro de la C.O., la KKS s-ro Nevan kaj la librotenistino f-ino Svensson. Ĝi estis la unua plena kunsido de la nova Estraro elektita en Helsinko.

PLI AMPLEKSA

Dec
de
Estrara
en Rot
(3-5 apr)

La Kunsido komenciĝis sub la negativa impresoj de la financaj rezultoj 1969. Ĝi ne estis bona jaro por la asocia kaso, kaj ĝi finiĝis per grava deficit. Feliĉe, tamen, la impresoj de 1969 kontraŭpezis la novaj esperoj por 1971. Dank' al pluraj gravaj ŝanĝoj, la Estraro povis akcepti buĝeton sen deficit kaj bazitan sur kiel eble plej objektivaj taksoj. La jaro 1971 povos esti la komenco de multe pli sana financa evoluo.

La plej granda unuopa kaŭzo de la deficit en 1969 estis la malaltaj enspezoj el membro-kotizoj. La buĝeto (farita frue en 1968) antaŭvidis kreskon de la nombro de individuaj membroj. Bedaŭrinde, kvankam la nombro de asociaj membroj estis nova rekordo, la ĉefa fonto de enspezoj — la individuaj membroj — ne kreskis. La altigo de la membro-kotizoj ekde la nuna jaro, kiel decidite en Helsinko, montriĝas vera neceso.

Alia grava faktoro en la deficit 1969 estis la malprofito de "La Praktiko". Pli frue la eldonado de tiu gazeto subvenciis la Eldona Fondado, sed tiu Fondado nun delonge elĉerpiĝis, kaj necesas akcepti ĝin kiel unu el la regulaj elspezoj de UEA. Feliĉe, transiro al alia presmetodo povos baldaŭ plejparte aŭ eĉ komplete forigi tiun malprofiton.

Tiun eblecon kreis la jam raportita aĉeto de kompost-maŝino kaj fotografia aparataro por la Centra Oficejo. La samaj investoj permesas an-

Memore al ERNFRID MALMGREN

(daŭrigo de p. 69)

katastrofe malfeliĉa periodo la Jarlibro kaj la organo de IEL plue aperadis kaj ludis decidan rolon en la kunteno de la restaĵoj kaj en la postmilita rekonstruado, kiu komenciĝis en 1946.

Dum la Kongreso de Bern (1947) okazis la re-unuiĝo. Generalo Bastien, jam en tre alta aĝo, ne plu deziris kandidatiĝi, kaj E. Malmgren estis unanime elektita prezidanto de UEA. Energie, celkonscie kaj lerte li gvidis la Asocion en tiuj malfacilaj postmilitaj jaroj, kiam ĉio mankis kaj kiam bezono por reorganizo estis ĉie sentata. Li donis fortan apogon al novaj ideoj, direktitaj al interna fortikiĝo de UEA, altigo de ĝia ekstera prestiĝo kaj konsiderinda vastigo de ĝia kultura agadkampon. Aparte menciindaj estas lia aktiva partopreno en la planado de niaj agadoj ĉe UN kaj Unesko en la periodo 1950-1954, kaj lia forta apogo al la interna reorganizo de UEA, kio rezultigis ĝian modernan strukturon ekde 1955.

Grava malsaniĝo

En 1954 E. Malmgren grave malsaniĝis kaj devis submetiĝi al tre malfacila kaj delikata operacio de la spino. Dum multaj semajnoj li devis kuŝi senmove en hospitalo kun la torso en gipso, sed eĉ en tiaj kondiĉoj li ne ĉesis labori. La lerteco de la kuracistoj kaj, verŝajne eĉ pli, la senfina



Ernfrid Malmgren en 1963 kun la tiam ĝenerala sekretario, prof. Lapenna, en amika konversacio post konferenco pri lerneja agado.

vivenergio de Ernfrid savis tiam lian vivon. Kun malmola gipsa ringego ĉirkaŭ la torso li veturis al la Kongreso de Bolonjo en 1955 kaj persone gvidis ĉiujn kunsidojn. Sur lia firma kaj trankvila vizaĝo neniu povis rimarki ian ajn signon de fizikaj doloroj, kiuj turmentis lin. Tio estis lia lasta Universala Kongreso. Pro la malbona sanstato li decidis ne kandidatiĝi por reelektado, kaj en 1956 prof. G. Canuto fariĝis prezidanto de UEA.

REVUO EN 1971

idoj

la

Kunsido

terdam

ilo 1970)

taŭvidi por la estonteco ankaŭ gravajn ŝparojn je la oficialaj eldonaĵoj de UEA: revuo "Esperanto" kaj Jarlibro, kaj tiu perspektivo kuraĝigis la Estraron plani la re-ampleksigon de tiuj eldonaĵoj. Ekde januaro 1971 ĉiu numero de "Esperanto" estos 24-paĝa, kiel ĉi tiu maja numero. Laŭ la nuna plano, la Jarlibro estos dividita en du pli-malpli egalajn partojn de po ĉ. 350 paĝoj. En la unua parto aperos sole nur la delegita adresaro; ĝi devas aperi kiel eble plej frue en la jaro. En la dua parto aperos la ceteraj rubrikoj, la detala librolisto kaj la Estrara Raporto.

Fruktoj de Institucio Hodler 68

Du aliaj tre pozitivaj faktoj kontribuas por pliheligi la financon. Unue, Institucio Hodler 68, starigita en la fino de 1968 ĝuste kun la celo finance subtenadi UEA, ĝis nun kolektis kapitalon de pli ol 130 000 guldenoj. Tiu kapitalo jam produktis pli ol 7 000 gld. da rento, kaj la estraro de la Institucio — ĵus kompletigita per al-elekto de s-ro G. Maertens (Belgujo) — baldaŭ decidis, kiel konkrete disponigi tiujn fruktojn. Due, la provizoraj ciferoj pri la Universala Kongreso en Helsinko montras favoran financon rezulton, kio donos novajn bonvenajn rimedojn al la finna Esperanto-

movado kaj samgrade ankaŭ al la Propaganda Konto de UEA.

La pli serena financa perspektivo, kune kun la plua modernigado de la ekipaĵo kaj labormetodoj en la Centra Oficejo (i.a. la Estraro aprobis la aĉeton de konvena librotena aŭtomato), permesas turni la pensojn al la "substanco" agado de la Asocio. La Estraro amplekse diskutis la agadon entreprenotan ĉe televidaj instancoj (vidu la artikolon ĉi-apude), decidis doni teknikajn helpojn por nova (anglalingva) eldono de la programita Esperanto-kurso de Hermann Behrmann — kaj eventuale mem eldoni ĝin en iu alia lingvo, diskutis projekton pri someraj universitataj kursoj, longe analizis la rimedojn por plibonigi la mondan informadon pri Esperanto. Ĝi ankaŭ decidis, ke UEA mem eldonos novan popularan legolibron ilustritan kaj — sur alia nivelo — presigos la Esperanto-tradukon de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj la Statuto de la Internacia Kortumo.

El ĉiuj detaloj pri la prepar-laboroj por la Universala Kongreso en Vieno ni elektu nur unu por aparta mencio: post pluraj malsukcesoj, en Vieno tute certe okazos la Infana Kongreseto, kun kvardeko da junaj partoprenantoj. En la momento de redaktado la nombro de aliĝintoj por la UK jam pasis 1500.

Diskutita kaj aprobita estas la definitiva kongresprogramo, en kiu ne mankas, kiel la unua laborkunveno de la semajno, jam en la antaŭkongresa vendredo... la venonta kunsido de la Estraro.

Malgraŭ la daŭra malboniĝado de lia sano, E. Malmgren ne ĉesis labori por UEA kaj por Esperanto ĝenerale. Interalie li restis modela administranto de la garantia fondaĵo de UEA ĝis 1961; prezidanto de la Kontrolkomisiono de Lernolibroj ĝis 1967; iniciatinto kaj organizinto de la grandega "parlamentara kampanjo" ekde 1964, kiu rezultigis la skandinavian proponon al Unesko en 1966. Tiu lasta agado estis tiel ampleksa, bone planita kaj realigita, ke ĝi sola postulus plurpaĝan artikolon. Sufiĉas nur diri, ke E. Malmgren persone ĉeestis la Ĝeneralan Konferencon de Unesko en 1966 kiel membro de la Sveda Delegacio en funkcio de konsilanto, kvankam la kuracistoj admonis lin ne veturi tien. Antaŭ la forveturo el Parizo E. Malmgren skribis: "Post streĉa laboro dum tuta monato, speciale streĉa pro mia malsano, kiu daŭre paralizas kelkajn nervojn kaj muskolojn en la dekstraj brakoj kaj kruroj, kio tre lacigas min, nun mi povas informi..." Tiajn sindonon kaj kuraĝon mi vere neniam renkontis en mia vivo. Des pli ke paralele daŭre malboniĝadis ankaŭ la sanstato de Linnea Malmgren.

En 1962 la Komitato de UEA unuanime elektis E. Malmgren Honora Prezidanto de la Asocio. Ĝi estas la plej alta honorigo, kiun UEA povas doni, kaj li plene meritis ĝin.

Ernfrid Malmgren restis fidela al si mem ĝis la lasta spiro. Ni restu fidelaj al lia memoro. Lia personeco inspiru kiel brila ekzemplo de senkompromisa fido je la praveco de nia starpunkto, kaj de sindediĉa, kuraĝa laboro por plene realigi nian taskon en la socio.

Unua plena TV-kurso en Esperanto

La unua ampleksa televida kurso de Esperanto en la historio okazos en Nederlando, plej verŝajne en la lastaj monatoj de 1971 kaj komenco de 1972. Tion jam firme decidis — post longaj nepublikaj diskutoj kun nederlandaj Esperanto-organizaĵoj — la institucio "Teleac", kiu regule produktas lingvajn kursojn por la televido.

Por la nederlanda Esperanto-movado la decido prezentas samtempe novan esperon kaj fortan defion. Ĝi devos mobilizi ĉiujn disponeblajn fortojn por efike ekspluati tiun senprecedencan eventon kaj zorgi, ke la novaj lernantoj trovu tuj kontaktojn kun alilandanoj kaj povu utiligi sian novan scion. La potencialo de tia kurso en Nederlando estas ankoraŭ tute netaksebla, sed estas signifa fakto, ke ankoraŭ hodiaŭ inter la aktivuloj de la nederlanda movado troviĝas multaj lernintoj de la sukcesaj radio-kursoj de la intermilitaj jaroj. Por la nun okazanta Teleac-kurso de la hispana lingvo 30 000 nederlandanoj pagis po 55 gld. pro la 10 diskoj kaj 20 broŝuroj, kiuj akompanas la studojn.

Teleac forte interesiĝas pri la ebleco vendi la Esperanto-kurson ankaŭ al alilandaj TV-kompanioj. La ideo de paralelaj, samtempaj TV-kursoj en du aŭ pli da landoj estas ankaŭ diskutata. UEA jam entreprenis paŝojn por interveni, pere de la landaj asocioj, en tiuj landoj, kie la kondiĉoj estas eble favoraj.



NEKONATAJ OPI

V.

La pensoj de Jan Amos Komensky pri la ebleco de internacia lingvo estas jam bone konataj. Ĝis nun, tamen, nur unuopaj frazoj aperis en Esperanto. Okaze de la 300-jara datreveno de Komensky ni ĉi tie publikigas novan tradukon de fragmentoj el ĉapitro 19 de la verko "Via Lucis" (1668). En Prerov, Ĉeĥoslovakujo, okazos de la 25a ĝis la 30a de julio 1970 internacia konferenco en Esperanto pri tiu granda pedagogo-filozofo.

"Ĉiuj nacioj ĝis hodiaŭ konstruas Babelturon kaj neniam sufiĉe komprenas sin reciproke..." — tiel skribis jam en 1668 Jan Amos Komensky (Comenius).

Okaze de la 300-jara datreveno de morto

La 15-an de novembro 1970 pasos 300 jaroj depost la morto de Jan Amos Komensky/Comenius (1592-1670), kiu per siaj pedagogiaj kaj filozofiaj verkoj certigis al si daŭran lokon en la monda kulturhistorio. Li estis la ĉefa reprezentanto de la ĉeĥa kulturo en la 17-a jarcento, fondinto de la moderna pedagogio, elstara lingvo-sciencisto, filozofo, profunda humanisto, larĝsenca demokrato, nelacigebla batalanto por justa paco en la militanta Eŭropo kaj entuziasma pledanto por la integre konceptita kleriga sistemo. Miriga estas amplekso de liaj verkoj: li estis la lasta "universala klerulo". Pluraj liaj ideoj estas jam realigitaj, pluraj atendas sian realigon. Al tiuj laste nomitaj apartenas ankaŭ la ideoj de Komensky koncerne universalan lingvon. Ĝis nun Komensky ne okupas sian merititan lokon en la interlingvistiko, kvankam li dediĉis al la problemo de internacia lingvo grandan atenton. El la verkoj de Komensky plej amplekse tuŝas tiun ĉi problemaron libroj "Panglottia" kaj "Via Lucis", ambaŭ skribitaj en la latina lingvo.

En la sekvanta parto de la artikolo mi prezentas tradukon de kelkaj tekstoj el la libro "Via Lucis (Vojo de la Lumo)"¹, kiuj rilatas al la afero de la internacia lingvo. Ĝis nun estis konata inter esperantistoj nur kelklinia citaĵo el tiu ĉi libro, kvankam pluraj alineoj ne estas malpli interesaj, kiel vi povos konstati. Sed unue kelkajn vortojn pri la libro mem: ĝi estis konceptita kaj skribita de Komensky dum lia restado en Anglujo (1641-1642).

Al Londono li estis invitita de membroj de la parlamento, por ke li klarigu tie siajn planojn de "pansofia",² kiujn la parlamento estis subtenonta. Pro la politikaj cirkonstancoj Komensky devis forlasi Anglujon kaj "Via Lucis" aperis libroforme nur en la jaro 1668 en Amsterdamo.

La konstruo de la libro estas mirige klara kaj funde pripensita. Por akiro de la universala lumo oni bezonas — laŭ Komensky — 4 aferojn. Universalajn librojn, universalajn lernejojn, universalan akademion de scienculoj kaj universalan lingvon. La universalaj libroj estu kompletaj sumoj de la homa scio, karakterizataj per ordoplena aranĝo, komprenebleco kaj vero. Konvena sistemo de la universalaj lernejoj helpe de la universalaj libroj edukos kaj klerigos principe ĉiun, sen escepto. La universala akademio estu tutmonda organizaĵo de plej elstaraj sciencistoj, kiu zorgu pri la scienca progreso kaj serĉu ĉiujn vojojn por plibonigo de la homa socio. Pri la ideoj de Komensky koncerne la universalan lingvon legu en la sekvantaj alineoj.

1. J. A. Comenii, "Via Lucis", la ŝtata pedagogia eldonejo, Praha 1961. (La unua eldono: Amsterdamo 1668.)
Comenii = de Komensky = de Comenius

2. Sub "lumo de saĝo" komprenu "universalan saĝon". "Pansofia" estis provo pri kreo de harmonia sistemo de sciencoj. La sistemo enhavus la sumon de homaj scioj ĉiufakaj. Laŭ la vidpunkto de Komensky "pansofia" devis esti elirpunkto por ekkompreno de la mondo kaj rimedo de reformo de la homa socio.

NIOJ DE KOMENSKY

Novobilsky

"Vojo de la lumo"

citaĵoj

☆ Neeviteble do ankaŭ nun, kiam oni serĉas renovigon de la tuta mondo kaj oni esperas ĝin, necesa estas la helpo de lingvoj, t.e. neceso aŭ de dono de iuj ajn lingvoj por tiuj, kiuj disdividos tiun ĉi lumon de saĝo² aŭ de iu sola lingvo, komuna por ĉiuj nacioj. Eĉ se ambaŭ ĉi-manieroj ŝajnus neeblaj, tamen ne estas tiel, sed la dua maniero estas pli facila, ol la unua. Ĉar estas pli facile, ke ĉiuj lernu unu kroman lingvon, ol unuopulo ĉion, se kompreneble oni estas atingontaj la celon per homaj laboro kaj klopodo.

☆ Certe do kleraj homoj devos pripensi manieron, pere de kiu ili facile povos akiri scion de iuj ajn lingvoj, t.e. de ĉiu lingvo de tiuj nacioj, kun kiuj oni havos kontakton, aŭ por ke ili konstruu ian unusolan lingvon, kiun ili uzos ne nur en sia reciproka rilato, sed ankaŭ povos facile instrui al ĉiuj, eĉ al plej malkleraj. Pri kiu ajn el tiuj du vojoj ili decidis, helpe de Dio rezultos iuj avantaĝoj.

☆ Plene tamen estas necese preferi la duan vojon, ke estu kreita iu lingvo komuna al la tuta mondo. Ĉar per ĝi ĉiuj komprenos sin reciproke pli bone, uzante la samajn vortojn, kaj tio estos eĉ unuarigarde klara signo, ke tiu ĉi universala lumo trapenetris al ĉiuj; klopodoj pri klerigo pli firme ankros ĉe ĉiuj kaj pli sekure disvastiĝos al la posteuloj. Kaj ĉiu, kiu volos, povos vojaĝi tra iuj ajn regionoj kaj mondopartoj, kaj komprenos ĉiujn homojn kaj ĉiuj komprenos lin.

Agrabla kaj aminda

☆ Sed ĉar tiu ĉi komuna peranto de la nacioj devas esti por ĉiuj sufiĉa, agrabla kaj aminda, por neniu malfacila kaj neŝatata, kaj ĉar ni tian peranton jam devas serĉi, mi ne povas ne citi ĉi tie konsiderojn de Ludoviko Vives³, kiu ankaŭ deziris unu lingvon por la tuta mondo — tiujn ĉi pensojn li pritraktis komence de la tria libro "Pri komunikado de sciencoj". Ĉar lingvo, kiel li diras, estas kaj instrumento de la homa socio kaj trezoro de klereco, estus utile por la homa gento, ke estu unu lingvo, per kiu ĉiuj nacioj povos paroli. "Ĝi estu ĉarma, sencotrifa kaj riĉa. Ĉarma per facila kaj agrabla prononco. Sencotrifa per adekvata kaj unueca signifo de la vortoj. Riĉa per diverseco kaj multeco de vortoj kaj formoj. Tiamaniere la homoj parolus volonte, trafus en ĉio kiel eble plej adekvate la sencon kaj ĉiam pli multe perfektigadus en juĝkapablo." Sed li aldonis: "Kaj el tiuj lingvoj, kiujn ni nun uzas, la latina ŝajnas al mi tia lingvo..."

☆ Ni konsentas kun li nur tiugrade, ke ni konsideras unu lingvon komunan necesa por la mondo. Kaj se ne estus iu alia, estus konvene difini por tiu ĉi bezono prefere lingvon latinan antaŭ iu el la ceteraj lingvoj. Sed ĉar niaj konsideroj nun strebas pli alten, ni ne povas fari alie, ol rekomendi prefere lingvon tute novan. Por ĉi tiu afero ni havas jenajn motivojn:

☆ Unue, per universala lingvo oni devas helpi al ĉiuj egalrajte. Per la latina lingvo ni helpus plej multe nur al ni, kiuj ĝin jam regas, ne ankaŭ al malkleraj nacioj, kiujn ni devas ĉi tie prefere konsideri, ĉar ili signifas la pli grandan parton de la mondo. Por ili la latina lingvo estas, same kiel la aliaj lingvoj, eĉ ankoraŭ pli, kaj nekonata kaj malfacila. Ĝi postulas nome tre laborstreĉan multjaran zorgon kaj koncentritan diligentecon, kiel spertas tion nia junularo kaj kiel montras tion la konstruo mem de tiu ĉi lingvo. Ĉar ĝi estas plena je diversaj 1) kazoj de nomoj, 2) tempoj kaj modoj de verboj, 3) konstruoj en sintakso, 4) en ĉio ĉi abundas je plej nombraj neregulaĵoj. Tion ĉion la italoj grandparte en sia lingvo eliminis. Tiel, eĉ malgraŭ tio, ke ŝajne ili degenerigis la latinan, ili tamen atingis tion, ke ilian lingvon (italan) tute volonte lernas ne nur preskaŭ ĉiuj nacioj eŭropaj, sed ankaŭ araboj, turkoj, tataroj kaj aliaj barbaroj, kvankam eĉ la itala lingvo ankoraŭ elŝovas siajn dornojn, t.e. suferas pro nereguleco. Kion ĉion ni povos poste atendi, se ni havus lingvon ankoraŭ pli facilan kaj en ĉio tute regulan kaj fluan!

La malriĉa latina lingvo

☆ Due, la universala lingvo devas esti el ĉiuj la plej riĉa, ĉiuflanke kontentiga, por ke ĝi taŭge sencotrifu ĉiujn aferojn kaj facile esprimu ĉiujn imagojn de la menso. Ke tia ne estas la latina lingvo, tion ĝi konfesas mem, ĉar ĝi estas malriĉa je kunmetaĵoj⁴ kaj ne tre fekunda rilate al derivaĵoj⁵. Tial ĝi pruntas tiom da vortoj de ekstere, precipe el la greka, de kiu ĝi tute dependas kaj sen kiu ĝi neniam atingas eĉ sian gradon de perfekteco. Kaj tiel forlasante unuecon kaj simplecon kaj ne atingante perfektecon, kian ni serĉas, ĝi sufiĉas nek al si, nek al la objektoj.

☆ Fine — kaj tio estas la ĉefa celo — la universala lingvo devas esti universala medikamento kontraŭ konfuzo de nocioj. Tio ne povas okazi alimaniere, ol ke ĝi progresos paralele kun la aferoj, havante nek pli, nek malpli da vortoj, ol kiom ekzistas da nocioj kaj se ĝi ligos vortojn tute precize nur laŭ tiu ordo, per kiu estas ligataj inter si la aferoj. Kaj nome tiel, ke jam la sono mem trafu la esencon de la aferoj kaj prezentu ĝin al la menso. Tion ĉi atingas la latina lingvo same mal-sufiĉe kiel iu ajn lingvo alia. Ĉar la homoj de pli

3. Ludoviko Vives (1492-1540), hispana humanisto.

4. Al Komensky ŝajnas la latina lingvo malriĉa koncerne al kunmetaĵoj, ekzemple kompare kun la lingvo germana.

5. Sub derivaĵo Komensky komprenas vortojn derivitajn de la sama radiko.

Nekonataj opinioj de Komensky

(daŭrigo de la antaŭa paĝo)

fruaj tempoj, la kreintoj de la lingvo, kiu konserviĝis al ni, ne estis tiel precizaj observantoj de la aferoj por observi ĉiujn diferencojn kaj esprimi ilin per vortoj trafaj kaj konvenaj. Ili kontentis povante esprimi aferojn konatajn kaj ordinariajn. Ja tre multaj vortoj aperis ĉe ili eĉ hazarde kaj sen ĉiu motivo; ili uzis ilin por signi tiun aŭ alian aferon. Ja eĉ malan nocion ili esprimis per la sama aŭ simila vorto kaj inverse la saman nocion per vorto mala. De tie originas ĉie abundo da homonimoj, sinonimoj, paronimoj, tropoj, figuroj, perifrazoj aŭ dusencoj, superfluaĵoj kaj konfuzoj. Kaj kiam ajn necese estas paroli pri aferoj pli precize, ni devas ĉiam aŭ prezenti difinon kaj denove kaj denove ni devas ripeti, kion ni komprenu per tio aŭ jeno. Aŭ ni estas devigataj ĝuste meze de konsideroj fari esceptojn, distingojn aŭ limigojn, pli ofte nearte aŭ sofisme, ol laŭ vero. Tiel ĉiam enŝteliĝas ĉi tien necerteco aŭ eblo de erarigo, ĉar eĉ ne la nocio mem estas sufiĉe liberigita de konfuzo.

Ni parolas vortojn, ne la aferojn

☆ De tio sekvas, ke ĉiuj nacioj ĝis hodiaŭ konstruas Babel-turon kaj neniam sufiĉe komprenas sin reciproke en tio, kion ili faras kaj parolas, ne nur homoj diverslingvaj, sed ankaŭ en la sama lingvo. Ĉar al la aferoj ne estis donitaj nomoj laŭ la esenco de la aferoj kaj ĉar fundamentoj de la aferoj malkovriĝas nek per uzado de lingvo, nek per reciproka harmonio, okazas, ke, kiam ajn ekestas malkonsento pri aferoj, homoj disputas tien, reen kaj faras nenion alian, ol interŝanĝi vortojn per aliaj vortoj. Ĉar se vortoj ne estas ekzakte adekvataj al la aferoj, tiam ili ne povas vekti imagojn adekvatajn al la aferoj. El tio rezultas, ke eĉ en la granda tumulto de sciencoj kaj diskutoj ni progresas nur tute ete en la studo de saĝeco, ĉar ni parolas vortojn, ne la aferojn.

☆ El tio do rezultas la konkludo, ke kontraŭ tiuj multnombraj malhelpoj kaj konfuzoj de reciproka rilato, kiuj ekestas el multnombreco, malfacileco kaj malperfekteco de la lingvoj, ne restas pli efika rimedo, ol konstrui novan lingvon, kiu superos ĉiujn jam konatajn lingvojn, estante 1) pli facila, por ke ni povu lerni ĝin sen perdoj tempaj kaj materiaj, 2) pli ĉarmasona, por ke estu ĝojo lerni kaj ellerni ĝin, 3) pli perfekta, tiel perfekta, kiel estas nur eble laŭ la karaktero de la aferoj kaj laŭ nia neperfekteco en ĉi tiu antaŭĉiela lernejo, por ke ties kono estu tre utila por kompreno de la aferoj mem.

Funelo de saĝeco

☆ Ni sopiras do la lingvon 1) plene racian, kiu laŭ la fakta kaj formala vidpunktoj havu en si nenion alian, ol tion, kio servas por esprimo de senco, ĝis la plej malgrandaj detaloj, 2) analogan, kiu enhavus en nenio neregulaĵojn, 3) harmonian, kiu ne enportus inter aferojn kaj nociojn iujn mis-

proporciojn, ĉar ĝi jam per la sono esprimus sencon kaj diferencigajn signojn de la aferoj. Jam per ĉi tio ĝi fariĝus tieldirite ia funelo de saĝeco⁶. Se tiu lingvo estus akceptita per la komuna konsento de la homa gento, ĉiuj kun ĝojo konstatus, ke ĝi estos la plej konvena rimedo por elvoko de reciproka inklino de homoj kaj por proksimigo de la nocioj al la vero de la aferoj. Ĉar nur tiam la epoko povos sin nomi klerigita kaj paca, kiam lumo kaj paco estos en aferoj, en nocioj de la aferoj kaj en vortoj, reprezentantoj de nocioj.

Doni samparolajn lipojn

☆ Sed oni prave nomos tion kulmino de Diaj mirakloj en la lingva sfero, se estos eble post tia diseriĝo kaj konfuzo konduki la lingvojn reen kaj konduki ilin en unuecon kaj harmonion, per trovo de la harmonia rilato de sonoj al la aferoj mem. Ĉi tiu ideo certe meritas, ke ĉiuj pripensu ĝin, kun konsidero al tio, ke sole per ĉi tiu vojo oni povas denove renovigi la disŝiritan unuecon de la nacioj, doni al la tuta mondo samparolajn lipojn kaj multobligi Dian gloron per tiel brila maniero.

☆ Eble troviĝos neniu, kiu ekdubus, ĉu estas permesite krei novan lingvon. Se tamen ekestus tia ideo en iu, mi respondas, ke tio estas permesita sekve de la rajto cedita de Dio al la homo (Genezo 2, 19). Ĉar kiel observado de aferoj, tiel donado de nomoj al aferoj estas parto de suvereneco pruntedonita al la homo super la estaĵoj. Kaj se Adamo, filozofoj, metiistoj kaj iuj ajn homoj rajtis ĝis nun doni al unuopaj aĵoj nomojn, kial ili ne rajtus krei ankaŭ verbojn, vorterojn kaj ceterajn konsistaĵojn, kiuj apartenas al la tuto de lingvo? Kaj se tiom da lingvoj ekestis pro hazardo, pro nura konfuzo, kial ne povus estiĝi ankaŭ unu lingvo laŭ prudenta plano kaj per arta unuecigo? Ĉar kial en ĉi tiu rilato ni lasu ĉion al hazardo kaj konduku nenion sur la vojojn de racio? Kaj se estas permesite korekti nociojn de aferoj laŭ la modelo de la aferoj mem, kial ne estus permesite modifi lingvon, por ke ĝi esprimu la korektitajn nociojn pli ĝuste?

La modelo de Zeuxis

☆ Se iu demandus pri la maniero, per kiu oni povus ĉi tiun lingvon krei, do proponas sin du manieroj, nome aŭ sub gvido de lingvoj jam konataj, aŭ sub gvido de la afero mem. La unua maniero estus laŭ la modelo de Zeuxis⁷. Li, intencante pentri Helena'n, kunirigis knabinojn elstare belajn, kiom li nur povis akiri; ĉion li sur ili atente priirigardis kaj transportis al sia Helena ĉiam tiun korpoparton, pri kiu li konstatis, ke per ĝi iu knabino multe superas la aliajn kaj per ĉi tiu maniero li feliĉe esprimis ian pramodelon de la plej perfekta ĉarmo. Io simila povus okazi ankaŭ en nia kazo, se ĉio, per kio iu lingvo elstaras en precizeco, beleco kaj esprimivo kaj apenaŭ iu estas

6. Funelo de saĝo = rapida maniero ion instrui al iu.

7. Zeuxis = glora greka pentristo, en la dua duono de la 5-a jarcento a.K.

tiel malfeliĉa, ke ĝi en io speciala ne superus la aliajn, ... tion ĉion se oni kolektus kaj harmonie kunigus en unu lingvon, por ke el pluraj ĉarmoj ekestu kvintesenco de ĉiuj ĉarmoj.

Ankaŭ kun loĝantoj de la Luno

☆ Sed la dua maniero estas pli afertrafa, nome ke kunmetontoj de la nova lingvo sekvu gvidon de la aferoj mem, precipe se ĉio devus esti adaptita al ties preciza esprimado. Ĉar nur en tiu ĉi kazo estos harmonio ĝusta kaj facila. La aferoj mem, sin prezentantaj al la sensoj de ĉiuj homoj per la sama maniero, faros tiun ĉi lingvon por ĉiuj facile komprenebla kaj imitebla. Mersenne⁸ kaj Le Maire⁹, kiuj estas el la plej erudiciaj francoj, opinias, ke ili jam feliĉe metis la fundamenton de tia lingvo. Ili fidis, ke per ĝi ili interkompreniĝus ne nur kun iuj ajn loĝantoj de la mondo, sed ankaŭ kun loĝantoj de la Luno, se ili ekzistas. Ni, bazante nin sur fundamentoj de universala saĝo, aŭdacas esperi pri lingvo, kiu estus dekoble pli facila, ol la latina, ĉar ĝi estus tute libera je ĉiuj neregulaĵoj. Kaj centoble pli perfekta, ĉar ĝi kapablus senpere esprimi ĉiujn nuancojn de aferoj kaj nocioj. Kaj miloble pli konvena por la harmonia esprimo de la esenco de la aferoj, ĉar ĝiaj unuopaj vortoj estus kiel difinoj, estante kreitaj laŭ numeroj, mezuroj kaj pezaj de la aferoj mem.

☆ Sed kio ajn estu koncerne al ĉi tiu komuna lingvo, ŝajnas, ke provizore estas necese rekomendi jenajn du aferojn:

a) Unue, ke sciencaj lingvoj, konsekritaj per surskribo de la kruco de Kristo, restu en la uzo de la sciencistoj: la lingvoj hebrea kaj greka precipe kiel fonto de la Dia Skribo, kaj la latina, ĉar ĝi entenas trezorojn de tiom da brilaj spiritoj.

b) Due, ke nacioj konservu kaj kulturu ankaŭ siajn proprajn lingvojn, ke ĉiu spirito laŭdu Di-Sinjon kaj ĉiuj lingvoj kantu al Dio. (Ni lasas al evoluo, ĉu tio estos konvena al tiuj, kiuj, provinse plene ĉi tiun plej ĉarman lingvon, ne povos poste ne timegi siajn barbarajn kaj krudajn lingvojn.)

EL ALIAJ VERKOJ

Krom la 19-a ĉapitro de la libro "Via Lucis", kies tuto estas dediĉita al la pritrakto de universala lingvo, Komensky tuŝas ĉi tiun problemon ankoraŭ kelkfoje en la teksto de aliaj ĉapitroj. Mi prezentas aldone ankoraŭ 2 citaĵojn, kiuj kompletigas la tekston de la 19-a ĉapitro. La unua devenas el la "Dediĉo" de la libro al la Reĝa Londona Societo:

Ĉar ni fine konstatis, ke, por la trapenetraĵo kun ĉi tiu lumo² al la nacioj, la sola, sed tre potenca obstaklo estas la multeco, diverseco kaj konfuzo de lingvoj, ni aŭdacas klopodi pri forigo

de tiu ĉi malhelpo per novaj konsiloj pri pli bona kulturado de ĉiuj lingvoj, pri plisimpligo de multlingveco kaj fine pri kreo de unu tute nova lingvo, tute facila kaj tute pripensita kaj filozofia, eĉ de "pansofia"², kiel rimedo de universala lumo.

La dua aldona citaĵo estas prenita el la 20-a ĉapitro:

Kiam ni havos la universalan lingvon kaj kiam ĝi komencos esti uzata de la nacioj, la tuta mondo fariĝos por sia loĝantaro alirebla, tiel ke al ĉiu estos eble laŭ plaĉo kaj sen malhelpo kredeble en ĉiuj mondopartoj vojaĝi, instrui kaj lerni. Ĉar se ĉiuj komprenos sin reciproke, ĉiuj estos kvazaŭ unu gento, unu nacio, unu domo, unu lernejo de Dio.

★

La prezentita teksto el la libro "Via Lucis" atestas pri la klara kaj penetra spirito de J. A. Komensky. Sed Komensky antaŭvidis ankaŭ malfacilaĵojn akompanantajn realigadon de liaj planoj. Precipe li sciis, ke "por grandaj laboroj estas necesa granda spirito" kaj kuraĝigis: "Ne estas kialo perdi esperon pri favoro de homoj, ĉar ... la celo estas por bono de ĉiuj".

Kaj laŭ li, "Ne estas necese konstante interkonsiliĝadi pri la laboro; estas necese ankaŭ agi, kvankam komence ne povas esti ĉio perfekta. Estas pli bone erari en io, ol maltrafi ĉion!"

INFORMEJO


Vi demandas — ni respondas

MI DEZIRUS scii vian opinion pri jeno: Kelkfoje dum varbado por Esperanto-kursoj mi aŭdis, ke Esperanto estas bela kaj sufiĉe riĉa lingvo, sed ne tiel riĉa kiel iuj naciaj lingvoj.

Respondo: Kontraŭ tia argumento ni konsilas paroli jene: Ĝenerale, ju pli multe uzata estas iu lingvo, des pli da nuancoj ĝi ricevas, des pli riĉa ĝi fariĝas en sia esprim-kapablo. En tiu senco, Esperanto estas jam multe pli riĉa hodiaŭ, ol ĝi estis en 1887, ĉar hodiaŭ ĝi estas multe pli vaste uzata. Se ĝin uzus centoj da milionoj aŭ eĉ miliardoj da homoj, ĝia riĉeco certe superus tiun de kiu ajn nacia lingvo. En la nuna stadio de la klopodoj enkonduki Esperanton, tro granda riĉeco de la vortaro kaj idiotismoj estus malavantaĝo, ĉar ĝi malrapidigus la lernadon. Provizore, do, Esperanto restas kaj devas resti iom malpli riĉa, en tiu senco, ol la plej uzataj naciaj lingvoj. Sed tion ĝi kompensas — kaj tion necesas forte akcenti — per la granda elasteco kaj esprim-kapablo, kiun donas ĝia unika strukturo. Tian elastecon havas certe neniu nacia lingvo.

8. Mersenne (1588-1648), franca matematikisto, teologo kaj filozofo. Li kontaktis kun Komensky, komunikis al li (22 nov. 1640), ke Le Maire malkovris alfabeton, pere de kiu li povus komunikiĝi kun homoj el iu ajn nacio.

9. Le Maire, hodiaŭ forgesita franco, eltrovinto de ia internacia alfabeto. (Vidu supre.)



ĈU LA AFRIKANS SUPERUS ESPE- RANTON?

Edwin
de Kock

Kiel la afrikansa lingvo, ankaŭ la arĥitekturo sud-afrika estas nederland-stila kaj samtempe originala. Foto: Bien Donn , Simondium, Kaba Provinco.   Satour, Pretoria.

Dum la pasintaj monatoj mi pli ol unufoje legis en nia gazetaro, ke Esperanto estas — kun la escepto de la afrikansa — la plej moderna, t.e. la plej juna lingvo sur nia terglobo. Tio estas erara. Kiel denaska parolanto de kaj nun ankaŭ literatura kaj lingvistika prelegisto pri la afrikansa, mi devas atentigi, ke Esperanto tamen estas multe pli nova, ol e  mia gepatra lingvo. La misideo, ke la afrikansa estas pli moderna kaj juna, devenas el la bedaŭrinda, tro propagandema entuziasmo de miaj samgentanoj, kiuj a  ne scias ion ajn pri Esperanto a   in ne rekonas kiel veran lingvon.

Pli a a, ol Esperanto

Post kvin jaroj Sudafriko festos la centan datrevenon de grava evento por la afrikansa,  ar la 14-an de a gusto 1875 fondi is organiza o, kiu ina guris la unuan movadon oficialigi  i tiun lingvon. Ne, vi ne mislegis: temas pri 1875! Esperanton Zamenhof lan is nur dek du jarojn poste, en 1887.

Veras, ke nur en 1925 la afrikansa efektive oficiali is, rezulte de dua, renaski inta movado. Tamen ekzistas en  i prozeroj kaj versa oj verkitaj jam ekde la komenco de la dekna a jarcento. Multaj reprezentas lingvan formon preska  identan kun la hodia a, kvankam — kompreneble — ne tiel ri an a  nuancoplenan el leksika vidpunkto.

Idoj de la deksepa jarcento

Lingvistikaj esploroj e  pravas, ke jam anta  proksimume tri jarcentoj, en la unua generacio, post kiam la nederlandanoj alvenis en Sudafriko, emer is la  efaj trajtoj de la afrikansa, kiuj  in distingas disde la tamen ankora  tre simila nederlanda. Efektive ili estis grand-parte spontana da rigo kaj pliakcelado de tendencoj komenci intaj en la popola (ne la literatura) nederlanda lingvo en E ropa,

anta  ol la kolonianoj forvoja is al la suda pinto de Afriko. Kaj la afrikansa kaj la nuntempa nederlanda —  ia E ropa fratino — estas idoj de la sama lingvo el la deksepa jarcento. La forvoja o de la kolonianoj al Sudafriko prezentis decidan pa on al disduigo. En nova lando ekfloris nova lingvoformo. Io simila, kvankam eble ne samskale drasta, okazis rilate al la angla en Usono kaj la portugala en Brazilo.

La historio de pluraj popoloj liveras similajn ekzemplojn de lingvo ekzistinta multajn jarojn sen agnosko anta  posta oficialigo. Oni  in longe ignoras kaj e  malestimas kiel ignorendan "dialekton", a  e  honeste ne rimarkas,  is la koncerna popolo  in subite — eble en kriza horo — bezonas. Tiam oni klopodas pri oficialigo, ofte kun sukceso. Oficialigo tamen ne signifas la komencon sed pli  uste la finfinan rekonon de lingvo, ne la unuan sed iusence la lastan  ian stadion.

Fulmostreka apero

Ni do povas kura e kaj fiere deklari, ke la internacia estas — se oni ne enkalkulas nurajn, abortajn projektojn — senescepte la plej moderna kaj juna lingvo en la mondo. Almena  la afrikansa jam estas du-  is trioble tiel a a kiel  i. Anka  pri tio mi ne povas ne atentigi, ke, se iu poste pretendus pri alia nacilingvo, ke  i tamen prezentas ion pli novan ol Esperanto, ni ne facilanime kaj senkritike kredis la eldira on. Nacilingvoj evoluas malrapide, kaj ni povas esti certaj, ke  iuj nuntempe oficialigataj komencis sian karieron de diferenci o disde siaj parencoj ne hiera  sed anta  jarcentoj a  minimume kelkaj generacioj. Nur konscie ellaborita interlingvo, kiel la genia krea o de Zamenhof, povas subite kvaza  fulmostreke aperi. Do Esperanto estas la plej moderna kaj juna lingvo en la mondo.  i estas, por sia destinita celo, anka  la plej bona.

SIBERIAJ SIMPATIOJ

Tricent desegnaĵoj de infanoj francaj kaj sovetaj cementis amikecon, kiu esprimiĝas nur per la Internacia Lingvo. La sperto de Eugène Wermelinger, fak-delegito en Guebwiller, Francujo, montras, kiel simplaj rimedoj de internaciaj interŝanĝoj povas allogi al Esperanto multajn milojn.

En n-ro dec. 1968 de ĉi tiu revuo, la Esperanto-Klubo de Barnaul (400 000 loĝ.) en Siberio petis, per anonceto, la alsendon de desegnaĵoj faritaj de infanoj por ekspozicio. La afero sukcesis tiel bone, enhavante ne-antaŭviditajn sekvojn, ke mi deziras ilin raporti internacie.

Anatol Gonĉarov, studento en Barnaul, kiu iniciatis la tutan aferon, informis al mi, ke 500 verkaĵoj alvenis al Siberio, el 16 landoj. El franca urbo Guebwiller (11 000 loĝ.), kie mi baraktas por disvastigi la Internacian Lingvon, alvenis 140 infan-desegnaĵoj.

Vidinte la anonceton de s-ro Gonĉarov, mi klarigis la aferon per senkosta anonco en la du regionaj ĵurnaloj, petante la kunlaboron de la junaj desegnemuloj. Mi turnis min ankaŭ al pluraj lernejoj kaj instruistoj. Al la infanoj, mi proponis libere desegni por etaj amikoj en Siberio kaj cetere skribi, sur la dorson de la folio, krom siajn nomon, adreson, aĝon kaj lernejon, ankaŭ kelkajn liniojn da klarigo pri la verkaĵo en la franca lingvo. Tiun francan tekston ni tradukis en Esperanton, kio ebligis al niaj siberiaj amikoj traduki ĝin en la rusan lingvon.

Kun granda miro, mi ricevis 140 desegnaĵojn de infanoj el mia regiono, por la infanoj de Siberio. Antaŭ la forsendo de la desegnaĵoj, mi profitis ekspozicii ilin en tri grandaj montrofenestroj sur la ĉefstrato de la urbo, kun eksplikoj pri la rolo de Esperanto en tiu agado. La gazetaro raportis. Al la partoprenintaj infanoj ni klarigis pri la rolo de la Internacia Lingvo per speciala informfolio.

Provi ĉiujn eblecojn . . .

Fine, niaj desegnaĵoj foriris ĝis fora Siberio, kaj baldaŭ, returne, ni ricevis, laŭ la sama modelo, 150 verkaĵojn de rusaj infanoj. Ni tuj ekspoziciis ilin en Guebwiller, kaj la gazetaro raportis longe kun pluraj fotoj. Poste, ĉiu partopreninta infano ricevis desegnaĵon de rusa amiketo. Ĉe la dorso, ĉiu infano povis vidi komplikajn signojn: la rus-lingvan klarigon pri la bildo, kaj sube Esperantan tekston kaj la francan tradukon.

Ĉio ĉi entuziasmigis la infanojn kaj ties gepatrojn. Per aldonita folio, mi proponis al la infanoj mem provi tuj sendi salut-karton al sia nova siberia amiko en . . . Esperanto. Kaj mi aldonis etan frazaron dulingvan: franca-Esperantan. De nia amiko Gonĉarov, mi eksciis, ke pluraj tion faris.

Por ekstimuli la rusajn infanojn al lerno de Esperanto, mi sendis 12 gratuleterojn al la infanoj siberiaj, kiuj faris la plej belajn verkojn. En tiuj leteroj, Esperant-lingvaj kaj tradukotaj en la rusan, mi esprimis la deziron, ke la infano, tiel talenta en

pentro-arto, al sia arto aldonu ankaŭ la arton sin komprenigi en la mondo per lingvo Esperanta!

Ankaŭ en Barnaul, laŭ raporto de s-ro Gonĉarov, la efiko estis mirinde bona. 20 000 personoj vizitis la ekspozicion en Barnaul, kaj 10 000 en la apuda urbo Kemerovo. 5 siberiaj ĵurnaloj longe raportis; 2 televidstacioj dissendis bildojn kaj intervjuojn; 2 radiostacioj raportis pri ĝi, kaj la aktualaj-filmo "Siberio sur ekrano", projekciita en multaj kinejoj, dediĉis tri minutojn al tiu pri-Esperanta afero.

Utila — ankaŭ "Semajno de Internacia Amikeco"

En mia urbeto la fajro ankoraŭ ne estingiĝis. Unue, mi entreprenis peticion ĉe la gepatroj de la partoprenintaj infanoj, por enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Pluraj dekoj da gepatroj esprimis la deziron, ke la Internacia Lingvo estu tuj instruata al iliaj infanoj en la lernejoj. La pri-lerneja inspektoro, iom favora al niaj klopodoj, transdonis niajn dezirojn pli supren, kaj post kelk-semajna atendado, ni ricevis la oficialan permeson por starigi Esperanto-instruadon en lernejoj. Kaj nun, efektive, jam funkcias kursoj en kvar lernejoj.

Laŭ niaj spertoj, se oni farus same aŭ simile, ankaŭ aliloke, ekzemple en la kadro de la Semajno de Internacia Amikeco, oni povus partoprenigi milojn da infanoj ne-esperantistaj al internacia kultura interŝanĝado, kaj eblus amaskomunike tuŝi milionojn da homoj!

Dank' al Esperanto . . . Tiel la afiŝita teksto prezentas la siberiajn desegnaĵojn elmontritajn en franca urbeto.



INFORMADO EN LA PRAKTIKO

H. Bakker

Antaŭ 35 jaroj mi komencis mian laboron por Esperanto en mia funkcio kiel sekretario de la informa fako de la Nederlanda Esperanto-Asocio "La Estonto Estas Nia".

La arĥivo montris, ke multaj homoj, kiuj lernis Esperanton, fariĝis membroj de nia asocio. Post nelonge 90 % ekŝiĝis kaj perdiĝis por nia movado. Kiam mi informiĝis pri la kaŭzo, la respondo estis preskaŭ sen escepto: "Esperanto estas bela kaj interesa, sed ĝi ne donas utilon al mi en la ordinara ĉiutaga internacia vivo."

Ĉar mi opiniis, ke konservi la esperantistojn estas minimume same grave kiel varbi novajn adeptojn, mi decidis turni min al la medio de la ĉiutaga internacia vivo kun la peto apliki Esperanton. Tio havas trioblan efikon:

1. la esperantisto restas esperantisto,
2. la forkurinta esperantisto revenos,
3. la ne-esperantisto lernos la lingvon.

Mi turnis min al la direktoj de turistentreprenejoj, hoteloj, restoracioj, trafikkompanioj, muzeoj, kampadejoj, benzin-stacioj kaj similaj adresoj. En ĉi tiu rondo mi ne parolis pri interfratiĝo, paco, literaturo aŭ poemoj. Mi atentigis pri

- a. la dinamika evoluo en la mondo,
- b. la kreskanta internacia kontakto,
- c. la akompananta lingvoproblemo,
- d. la delikata kreskanta nacia sento,
- e. la solvo Esperanto.

Mi menciis, ke interalie jam aplikas Esperanton radio-stacioj, turismo, fervojo-kompanioj, restoracioj, industrioj kaj foiroj.

Por kontribui al ĉi tiu agado estas plej simple pendigi konversacio-blokon sur okulfrapan lokon. Tiu bloko konsistas el ŝildo, kiu surhavas 50 deŝireblajn foliojn. Kliento povas deŝiri folion. Folio havas du kolonojn. En la maldekstra kolono

Sep mil individuaj kaj dudek sep mil asociaj membroj — tio estas la membro-nombro de UEA. Ĝi ne estas bagatela nombro, se oni konsideras la grandajn rezistojn kaj antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto. Sed se oni rigardas la mondampleksan taskon de la Asocio, ĝi estas nenio. Kiel do kreskigi ĝin?

S-ro Kaukal, vi mem nur 5-6 jarojn estas individua membro de UEA, sed en tiu tempo vi varbis por la Asocio ne malpli ol 13 dumvivajn membrojn. Ne estas sekreto, ke multaj aliaj membroj, eĉ malnovaj, neniam sukcesis varbi novan membron. Kiel vi sukcesis?

Ĉiu, kiu ne estas tro ne-agema kaj kiu efektive volas ion fari por UEA, povas sukcese varbi individuajn aŭ dumvivajn membrojn.

Se mi parolas kun malnovaj aŭ maljunaj aŭ mezjunaj esperantistoj pri la estonteco de la Esperanto-movado en la tuta mondo, kies centro estas UEA en Rotterdam, Nederlando, tiam mi diras: "ĉiujare vi devas pensi pri la pago de viaj kotizoj al diversaj organizaĵoj. Vi turmentas ĉiujare vian cerbon, por ke vi ne forgesu pagi tiun aŭ alian gravan jarkotizon, — ekzemple vian jarkotizon al UEA. Fariĝu Dumviva Membro de UEA kaj vi povos nuligi viajn zorgojn, kaj vi ricevos precize ĉiumonate la revuon "esperanto" de UEA. Jes, mi scias, pago de 600 ned. guldenoj estas "granda doloro por via monpoŝo", — sed nur unufoja "doloro"! Poste vi povos trankvile vivi cent jarojn aŭ pli. Krome: tiel vi "trafos du muŝojn per unu bato"; vi ricevos trankvilecon, kaj UEA — monon.


Li varbis 10



Intervjuo kun Walter Kaukal,
Neustadt/Weinstr.
(F.R. Germanujo)

Inter la novaj dumvivaj membroj, kiujn vi varbis, pluraj eĉ neniam antaŭe estis membroj, sed pro viaj argumentoj tuj fariĝis dumvivaj membroj. Kio estis la ŝlosila argumento?

Se mi diskutas kun junaj homoj, kiuj poste ekkonas la valoron de la Internacia Lingvo Esperanto kiel unika solvo de la lingva problemo en Eŭropo kaj en la tuta mondo, mi fine diras: "Pripensu:



La diversaj jam atingitaj oficialaj aplikoj de Esperanto en la praktiko estas ofte ne sufiĉe konataj.

staras la teksto en Esperanto; en la dekstra kolono staras apude la nacia traduko. Kun la folio oni povas iri al la dejoranta oficisto por montri la deziratan frazon.

Jam ekzistas tiaj broŝuroj. La avantaĝo de bloko kompare kun frazlibro estas:

- folio ne prenas tiom da loko en la poŝto,
- la ŝildo, kiu surhavas grandlitere la vorton **ESPERANTO**, estas konstanta atentigo kaj pruvo pri la praktika valoro de nia lingvo,
- la dejoranto aŭ kelnero ne bezonas lerni Esperanton jam antaŭe,
- la kostoj de blokoj estas multe malpli altaj.

Per tiuj argumentoj mi jam ĝuis sufiĉe gravan sukceson ĉe la telefonservo, la asocio por fremdultrafiko la kompanio Wagons-Lits, Ruĝa Kruco, la turistinformejo en Amsterdam: ĉiuj mem pagis la kostojn por la materialo. Samtempe mi rimarkis, ke ekzistas pli da simpatio por Esperanto, ol mi atendis.

Mi verkis ĉi tiun artikolon interalie kun rilato al la kampanjo de sinjoro Hermann Behrmann, Löhne, por ke la novaj adeptoj post la kurso ne perdiĝu pro la motivo: Esperanto estas bela kaj interesa, sed ĝi ne donas utilon al mi en la ordinara ĉiutaga internacia vivo.

dumvivajn membrojn!

- la lokaj Esperanto-reprezentantoj, la lokaj Esperanto-rondoj kaj la lokaj Esperanto-grupoj estas valoraj por la disvastigo de Esperanto, ...
- la landaj Esperanto-asocioj estas necesaj, ĉar ili konas la apartan karakteron de la tieaj homoj kaj de la popolo, ...
- sed la plej gravajn taskojn povas kaj devas transpreni kaj plenumi nur iu granda organizaĵo, kiu respondecas por la tuta mondo, kaj tiu organizaĵo estas Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam, Nederlando. Tiu centro devas havi:
- ne nur individuajn membrojn (kies nombro ĉiujare ŝanceliĝas pro ne-pago de la kotizoj aŭ pro morto de la maljunaj membroj), ...
- sed ankaŭ monrimedojn por antaŭe kalkuli la elspezojn.
- do, praktike dirite, mia juna amiko, — tiu centro devas havi Dumvivajn Membrojn (DM), kaj — se estus nepre necese, mi donus al vi malgrandan komenc-krediton."

Se ĉiu individua membro de UEA varbus ĉiujare almenaŭ 2 novajn membrojn, kiel vi, la kresko de la Asocio estus rapidega! (1,7 miliardoj da membroj ĝis 1980!) Evidente, multaj membroj simple ne havas eblecon varbi membrojn, pro unu kaŭzo aŭ alia, do tia kresko estas idealo neatingebla. Tamen en sia laborplano UEA starigis al si la celon baldaŭ atingi 10 000 individuajn membrojn. Ĉu vi opinias tiun celon realeca?

Ne kredu, ke mi estas fantaziulo — sed mi opinias, ke Universala (tutmonda) Esperanto-Asocio devus

havi minimume 100 000 individuajn membrojn! Kiamaniere?

Multajn esperantistojn tedeas, ke ili devas pagi diversajn jarkotizojn:

- al la landa Esperanto-asocio
- al la monda Esperanto-asocio
- (al la diversaj fakaj Esperanto-organizaĵoj).

Ili pagus volonte unu pli altan jarkotizon, se ili estus tiamaniere individuaj membroj de la monda Esperanto-asocio, kaj samtempe de la landa Esperanto-asocio (aŭ kontraŭe, ekzemple GEFA-IFEFF).

Mi opinias, ke la plimulto komprenus la utilon de tiu nov-ordo.

Krome mi proponas, aranĝi en la UEA-revuo "esperanto" konstantan anguleton, ekzemple, sub rubriko "KIAL VI POSTRESTAS?!", kiu tekstas, "El Japanujo anoncis sin dum la lasta kvaronjaro 10 novaj individuaj UEA-membroj. Kial postrestas la aliaj landoj? Kial postrestas via varbado de novaj UEA-membroj?"

Persono, kiu tiel persiste varbas por UEA, evidente devas senti sin forte ligita al la celoj de la Asocio. Kio por vi estas la plej grava motivo por fariĝi kaj resti membro de UEA?

La plej grava motivo estas por mi simple jena fakto:

- iu loka Esperanto-grupo povas "ekdormi"; iu landa Esperanto-asocio povas ricevi mal-laborremancan estraron ...
- sed unu granda, bone funkcia Universala (tutmonda) Esperanto-Asocio devas ĉiam, ankaŭ estonte, ekzisti, vivi kaj labori, por atingi la celon: enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn en la tuta mondo, kaj jam ekde la unua klaso en la popol-lernejojn.

KIEL ATINGI VASTAN PUBLIKON?

Mankas ankoraŭ kompleta superrigardo pri la mond-vasta agado en 1970 okaze de la Semajno de Internacia Amikeco. La sekva ekzemplo el nur unu urbo en Belgujo tamen servu por montri, kion oni povas kaj devus atingi en ĉiuj iom gravaj urboj de la mondo — ne nur okaze de la Semajno...



Kulture valoraj programoj, solene kaj alloge prezentitaj, povas krei grandan simpaton por Esperanto.

En junio 1969 fondiĝis en Antverpeno "Esperanto Kultureel Aktiekomitee" (Esperanta Kultura Agadkomitato). Ĝia celo estas: konigi Esperanton ekster la tradiciaj medioj per taŭgaj, altnivelaj kaj tre bone organizitaj programoj, artaj, variaj, distraj.

Ĉi tia agadmaniero ŝajnas entuziasmi ne nur esperantistojn sed ankaŭ multajn ne-esperantistojn. "Ni bezonas elpaŝi el nia ebura turo", diras Jo Haazen, tre konata antverpena artisto kaj prezidanto de la komitato. "Niaj sukcesoj dependis kaj dependos de niaj kapablecoj, amikaj interrilatoj, kunlaborado kaj de energio de la volo..."

Unua sukceso

Unuan sukceson ni havis en la 15a de junio 1969. Ni estis invitintaj ĉeĥan ĥoron el Brno, kies prezidanto estas esperantisto, Sub gvidado de prof. Karel Hradil, tiu ĥoro prezentis sin matene en la belega antikva preĝejo Sankta Paŭlo kaj akompanis la sanktan meson. Ĉeestis pli ol 900 homoj, kiuj admiregis la eksterordinare altajn kvalitojn de la internacie bone konata trupo kaj kiuj eksciis tie pri Esperanto. Vespere okazis koncerto kun tre belaj muzikaĵoj. La salono, kun 220 sidlokoj, estis plenplena, multaj ĵurnalistoj ĉeestis, kaj la anoncoj kaj priskriboj okazis nederlandlingve

kaj Esperante. Multaj ĵurnaloj skribis longajn recenzojn kun tre favora sinteno al Esperanto.

Kun gitaristino

Dua sukceso estis la "Zamenhof-vespero" en decembro. Ni invitis konatan klasikan gitaristinon el Parizo, de la supera instituto por muziko, f-inon Godelieve Monden. Krome kelkajn skoltajn sakfajfistojn en la kadro de la oficiala transdono de la Esperanto-lernolibreto por skoltoj "Ĵamborea Lingvo". Denove la salono estis plenplena, pli ol 150 esperantistoj kaj ne-esperantistoj ĉeestis, kaj ĉiuj povis ĝui altnivelan artprogramon. Ankaŭ ĉi tiu okazintaĵo allogis la ĵurnalistojn, kiuj poste ege favore komentariis nian laboron.

Amikeca Semajno

Tria sukceso. La Semajno de Internacia Amikeco alportis novajn ideojn. Entuziasmigita de la antaŭaj realigoj, grupeto da homoj, precipe junaj esperantistoj, eklaboris por sukcesigi la belan iniciaton de s-ro E. Carlén.

Organiziĝis impona honora komitato. Ni forsendis gazetarajn komunikojn kaj presigis belajn invitkartojn al Festokunveno, kiun ni firme organizis. Ni presigis ankaŭ belaspektajn program-broŝurojn kaj invitis multajn personojn. Krome, la urba konsilantaro disponigis al ni unike belan festsalonon. Intertempe ni kontaktis kun la ministerio pri instruado, prezentante al la ministro jam ellaboritan planon enhavantan ĉiajn aspektojn pri la Semajno de Internacia Amikeco, petante lin oficiale konigi tiun planon al ĉiuj ŝtataj belgaj lernejoj. La ministro favore respondis, menciante, ke li plenumigos nian peton.

La festokunveno mem estis grandioza! Ĉio en Esperanto kaj nederlandlingve. Salutoj el 18 diversaj landoj, eĉ el Sudano kaj Indonezio. Dancis konata popoldanca grupo "Mieke Stout" kaj norvegaj studentoj de la antverpena universitato. Kantis la fama kantistino, konata de la radio kaj televido, Cecile Van Dyck, ankaŭ en Esperanto.

Ĉeestis tre varia publiko: laboristoj, anoj de junularaj movadoj, universitataj studentoj, instruistoj kaj profesoroj. Abunda sukceso, ege entuziasma publiko, eksterordinare amikeca atmosfero, tro malmulte da seĝoj. Efektive, 250 seĝoj ne sufiĉis, kaj pluraj vizitantoj devis alrigardi la spektaklon starante malantaŭe en la salono. Denove la ĵurnaloj malavare kaj bone raportis. Denove Esperanto estis iom pli respektata!

Sekve de ĉi ĉio ekestis jam valoraj kontaktoj kaj interrilatoj kun ne-esperantistaj organizaĵoj kaj ĵurnalismaj medioj. Ni sukcesis publikigi kelkajn longajn artikolojn pri la Internacia Lingvo en alte taksataj revuoj kaj povis disponi pri 33-minuta radioprogramo (Radio Antverpeno) dediĉita al Esperanto. Ĉi ĉiel ekestas nuntempe kreskanta intereso pri la lingvo en Antverpeno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ni esperu, ke ĉi ĉio daŭru!

Antverpen-ano



BRILA LERNOLIBRO

Recenzas S. Milojević (Beograd):

Esperanto-lernolibro por 10-14-jaraj infanoj (2-a volumo) de d-ro István Szerdahelyi. Budapest: Tankönyvkiadó, 1968. 227 p. Ilustr. 24 cm.

Jam la unua volumo de ĉi tiu libro (aperis fine de 1965) rikoltis preskaŭ nur aklamojn. La sola grava rimarko direktita al tiu unua volumo estis ĝia ŝajna dulingveco, kiu onidire malhelpus ĝian internaciskalan uzadon. La ĵus aperinta dua volumo forigis ankaŭ tiun "mankon" kaj la patrolando de la libro konjekteblas sole laŭ Esperanta-hungara vortareto ĉe la fino.

La nova volumo enhavas 24 lecionojn (ĉiu kvina estas resumo de la antaŭaj kvar) sur 170 paĝoj, kion sekvas 7-paĝa krestomatia ĉapitro (ĉefe poemoj); 22 paĝoj estas destinitaj al gramatikaj klarigoj (ofte elĉerpe detalaj, kun ekzemploj), kaj 25 paĝojn okupas la vortaro enhavanta preskaŭ 2000 vortojn, el kiuj iom pli ol 800 aperas la unuan fojon en ĉi tiu volumo. La tuto estas prezentita en dinamisma sinsekvo kun interesaj legaĵoj, vigla demandaro, trafaj ilustraĵoj, kantoj, bone elektitaj taskoj kaj ekzercoj. (daŭrigo dekstre)

Kvankam nur la aplikado de lernolibro povas fine kaj nete verdiski pri ĝiaj kvalitoj, en la kazo de d-ro Szerdahelyi oni preskaŭ kun certeco povas apriorie aserti, ke temas pri lernolibro, kiu viciĝas inter la plej bonaj en nia historio. Tiuj du volumoj kun siaj 440 paĝoj finfine forigas ankaŭ la mistifikon, ke por bone ellerni la lingvon sufiĉas dek-leciona broŝureto. Krome, per la elekto de legaĵoj (internacia laŭ origino kaj temaro) d-ro Szerdahelyi agnoskas la fakton, ke la nunaj 14-jaruloj estas intelektu pli altnivela ol estis li, mi kaj vi en tiu aĝo.

Konklude: bonega lernolibro, per kiu la aŭtoro plenrajte aliĝas al la plej sukcesaj kontribuintoj sur tiu kampo, kiel Cseh, Szilágy, Setälä kaj Auld.

Mendu ĉe UEA: 5,50 gld. + sendokostoj 10 %.

LA INFANECO

Recenzas Probal Daŝgupto (Kolkatao):

Iu finna infanaĝo, de E. Rasku. Kulju: la aŭtoro, 1969, 14 p. Ofset. 21 cm.

La verkinto celas kun ni kunreĝui sian infanecon. Kun simpatio ni konatiĝas kun finna instruistado sinĝena, kiu amas la naturon kaj malamas la militon; ni legas, kiel li forludis kun siaj gefratoj la infanaĝon kaj kiel li faris heziteme la unuajn paŝojn adaptiĝi al la lernejkolegoj.

Tamen mi ne opinias, ke ĉi tiu verko enviciĝas kun aliaj aŭtobiografioj. Nian konatiĝon kun la aŭtoro malhelpas la malgrandegaj tipo kaj amplekso. Cetere la lingvaĵo ne estas tre bona: ĝenas dek ses gravaj eraroj, multaj preterlasitaj "la"-j, multaj "evidente"-j, vortordo iom tro libera, nenorma prepoziciuzo kaj pluraj "est"-oj anstataŭ "estas", kiuj lastaj povas ne esti tajperaroj.

Mendu ĉe UEA: 2,22 gld. + sendokostoj 10 %.

Kulpas lernejoj sistemoj

Skribas Reinhard Haupenthal (FRG)

La ĉefartikolo de Miyamoto masao en la marta numero levas plurajn demandojn. Mia unua impresio estis, ke, kiel ajn prava principe, la aŭtoro momente postulas neblajon. Li forgesas aŭ preteratentas, ke la eŭropaj esperantistoj trapasas lernejojn, kiuj, dank' al sia lingvoinstrua sistemo aŭtomate riglas kontraŭ aziaj kulturoj. Suprajn konojn liveras eventuale la instruado de religio kaj historio. Aliflanke la klera japano ja konatiĝas kun iu(j) eŭropa(j) lingvo(j) kaj sekve kulturoj.

Krome Miyamoto malatentas, ke la plimulto de esperantistoj (kredeble ankaŭ aziaj), eĉ se ĝi bone konas sian propran nacian kulturon, nur magre konas la originalan Esperantan literaturon kaj ne pretas ĝin subteni. La morto de literaturaj revuoj kaj ŝimado de beletraĵoj tion pravas.

Se do ne estas konata la propra kulturo Esperanta (kaj propra ĝi ja devus esti por ĉiuj, kiuj rigardas Esperanton kiel sian propran lingvon), ne mirigas dorsoturno al transmaraj ekzotikaĵoj.

Aliflanke mi volonte cedos al Miyamoto, ke li starigas postulon nepre konsiderotan en starigo de estontaj lernejoj programoj de Esperanto, kiuj en pluraj punktoj ne povos respeguli kaj sekvi nunajn praktikojn kaj morojn de la Esperanto-movado.

Laste aperis . . .

grava novaĵo sur la bibliografia kampo: duvoluma katalogo de la Esperanto-kolekto en la universitata biblioteko de Amsterdam. La volumo I ampleksas librojn kaj broŝurojn; la dua periodaĵojn. Kune ili konsistas el preskaŭ 400 paĝoj. La ofsete presitaj katalogoj kostas respektive 30,— kaj 7,50 gld.

El la mond-ekspozicia urbo Osaka alvenis romano de Nagayo yosio: "Kristo el bronzo", tradukita de Ueyama masao (bela volumo, 108 p.; eld. Pirato; 4,50 gld.). La samlanda Amo-Akademio eldonis diskon "Deklamado de s-ino S. Tutui". Ĝi taŭgas, laŭ la enhavo, nur al japanoj.

Du pliaj germanaj urboj havas Esperanto-prospekton: Darmstadt (eld. Verkehrsamt, Wilhelminenstr. 17) kaj Aachen, kie okazis en marto Trilanda Esperanto-Kongreso. Kiu ne povis ĉeesti la Trilandan Kongreson, povas tamen mendi ĉe UEA ĝian kongreslibron (0,50 gld.) aŭ la dokumentujon kun diversaj prospektoj (1,— gld.)

Brazilo

- La urbestrejo de Pindamonhangaba (40 000 loĝ.) subskribis kaj solene disdonis diplomojn de Brazila Esperanto-Ligo por komunuma kurso, la 15an de februaro.

- Novajn Esperanto-stratojn havas du universitataj urboj: Juiz de Fora kaj Sao Carlos (SP); la respektivajn decidojn enhavas leĝo 3392 de 12. feb.70 kaj dekreto 6381 de 24.feb.70. Nuntempe ekzistas ĉ. 50 tiaj stratoj en Brazilo. La strato en Juiz de Fora portas la nomon "Esperanto", dum tiu de Sao Carlos portas la nomon "Dr. Luis Lázaro Zamenhof".

- Okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, la Federacia Universitato de Ceará havis ekspozicion de lingvaj kursoj, i.a. de Esperanto. Krom la profesoroj kaj studentoj de la universitato vizitis ĝin multe da aŭtoritatuloj.

- La brazila ministerio de komunikado ekuzis Esperanton por siaj oficialaj gazetaraj komunikoj. La 6an de marto 1970 ĝi dissendis al la Esperanta gazetararo sciigon pri radio-amatora konkurso, kiun ĝi organizas okaze de la tago de telekomunikoj, la 17a de majo.

Eŭropo

- La trilandna Esperanto-kongreso (germana-

Parto de lerte aranĝita ekspozicio en Ceará (vidu ĉe "Brazilo")



belga-nederlanda) okazinta en Aachen, 27-31 marto, eldonis rezoluciojn pri la lingva problemo en Eŭropo kaj pri eŭropa agado de Esperanto-asocioj. Ĉeestis preskaŭ 300.

GDR

- Sub la titolo "Panorama DDR", la eksterlanda gazetara servo de Germana Demokratia Respu-

INFORMOJ DE CED

"CED": CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middx., HA9 8TF, Britujo. Telefono (01) 904 4081.

UEA kandidato por la Nobel-Pacpremio 1970

Ankaŭ en la jaro 1970 UEA estas kandidato por la Nobel-Pacpremio. Laŭ la informoj ricevita en CED, minimume 25 kvalifikitaj personoj prezentis la proponon, nome 4 el Britujo, 16 el Danlando, minimume 1 el Finnlando, 1 el Svedujo kaj 3 el Norvegujo. Verŝajne estis ankaŭ aliaj proponintoj, sed pri ili CED ne estas informita. Kompreneble, kiel kutime, estas ankaŭ aliaj kandidatoj. Pri la premio decidas la Nobel-Komitato en Oslo. Ĝia decido estos baldaŭ konata.

"Kun granda interesiĝo"

Kiel oni povis legi jam en la aprila numero de "Esperanto", CED lastatempe sendis elektitajn artikolojn el la revuo "La Monda Lingvo-Problemo" al delegacioj ĉe UN (la artikolon de prof. Lapenna) kaj al ambasadoj en Nederlando (la artikolon de ambasadoro Ralph Harry).

La efikon de tiaspeca informado ilustras la fakto, ke ĝis la momento de redaktado — kvankam la artikolojn akompanis nur presita klarigo — jam venis al la adreso de CED en Rotterdam deko da apartaj leteroj, en kiuj la delegacioj aŭ ambasadoroj respektive dankas pro la atentigo pri la artikoloj. La reagoj venis de la reprezentantoj de:

Hinda Unio, Tunisio, Luksemburgo, Vatikano, Aŭstrujo, Nov-Zelando, Italujo, Belgujo kaj Indonezio.

Pluraj diplomatoj esprimis grandan interesiĝon pri la enhavo de la artikoloj. La ambasado de Indonezio, ekzemple, skribis: "La Monda Lingvo-Problemo laŭ nia opinio montriĝos tre utila. Ni tial decidis aboni ĝin ekde la unua jarkolekto."

Bibliografio de terminaroj

Jus aperis ĉe Unesko nova (jam la 5a) eldono de la bibliografio de plurlingvaj sciencaj kaj teknikaj vortaroj, kiun ĝi publikigas sub titolo trilingva (angla-franca-hispana). La nova verko listigas entute 2 491 vortarojn dividitajn laŭ 263 temoj kaj en 75 lingvoj. La trilingva antaŭparolo klarigas, ke la redaktoroj konsideris nur tiujn vortarojn, kiuj aperis post 1949. La rapida progreso de la scienco — tiel ili argumentas — jam malaktualigas kaj malvalidigas la pli frue eldonitajn terminarojn.

Esperanto aperas en 8 el la vortaroj, same kiel la kimra lingvo. Inter la malpli ofte aperantaj lingvoj estas la bengala kaj kroata (po 6-foje), urdua (5-foje) kaj tamila (3-foje), krom multaj malpli konataj.

Nuntempe kompilata kaj kompostata por CED estas nova bibliografia dokumento pri Esperantaj terminaroj, la ĝis nun plej kompleta listo iam aperinta. La nova dokumento de CED permesos kompletigi kaj ampleksigi la bibliografion de Unesko.

PER- SONE

bliko (DDR-1054 Berlin, Wilhelm-Pieck-Strasse 49) komencis en marto 1970 eldoni stencilitajn novaj-bultenojn pri sia lando en la Internacia Lingvo.

Kanado

- Instigite de letero aperinta en "Esperanto", Kanada Esperanto-Asocio organizas, ke telefon-numeroj aperu en telefonlibroj tra tuta Kanado sub la vorto "Esperanto".

Koreujo

- Fine de aprilo vizitis Seulon 16 japanoj, inter kiuj profesoroj el la universitatoj Tokio, Nippon kaj Ĉuuo. La diskutoj temis ĉefe pri komuna Esperanto-kongreso japana-korea.

Svedujo

- Inter la prelegontoj ĉe la 64a landa jarkongreso de Sveda Esperanto-Federacio (16-18 majo) troviĝas la prezidanto de UEA prof. Lapenna kaj vic-prezidanto s-ro Erik Carlén. Predikos episkopo Sven Danell. La sveda TEJO-sekcio aranĝas oratoran konkurson, kaj la sveda poŝto pretigis specialan poŝtan stampon.

FAKE

Mensa

- La 19a Internacia Ĝenerala Kunveno de la inteligentula organizaĵo MENSA okazis en Nov-Jorko la 7an de marto 1970, en ĉeesto de reprezentanto de UEA (s-ro Mark Starr). Ĝi aprobis la

starigon de Esperanto-sekcio sub la nomo ES-PERMENSO. La nova organizaĵo fondiĝis jam kun 23 membroj, kaj kreskas je po 3-4 membroj semajne. Provizoraj prezidanto kaj sekretario estas respektive: Philip Trubey (Ottawa) kaj Harry Lewis (P.O. Box 1322 North P.O., Halifax N.S., Kanado). Por pliaj informoj vidu en "Esperanto" februaro, p. 22.

PERSONE

Balda

- S-ro Tomáš Balda, membro de UEA kaj komitatano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, en februaro ricevis la Ĉeĥoslovakon Pacpremion, interalie pro sia per-Esperanta pac-agado. La premion ricevas ĉiujare nur kelkaj personoj, kutime 10, kaj la distingon raportis la tuta landa gazetaro.

Görlich

- Prof. d-ro Ernst Görlich, fak-delegito de UEA en Vieno pri historio, estas kun-aŭtoro (kun Felix Romanik) de nova germanlingva "Historio de Aŭstrujo", eldonita ĉe Tyrolia, Innsbruck, okaze de la 25-jara datreveno de la Dua Respubliko.

Rytjkov

- Aktoro Nikolaj Rytjkov vizitis Malton en marto. Intervjuon, ĉe kiu interpretis la prezidanto de Malta Esperanto-Societo, elsendis po tri fojojn la radio kaj televido. Intervjuis ankaŭ ĵurnalo.

Esperanto uzata dum 20 jaroj ĉe hispana radio-stacio

Okaze de la 20-jara datreveno de la Esperanto-sekcio de Radio Valencio, la loka Esperanto-grupo donacis artan arĝentajon al la radio-direktoro.

En la pasinta 13-a de februaro, "Micrófono Esperantista (Mikrofono Esperantista)" de Radio "La Voz de Levante" en Valencio, Hispanujo, celebris la 20-jaran datrevenon de sia fondiĝo. Tiucele, la prezidanto de la Valencia Grupo de Esperanto, s-ro Johano Devis, donacis artan arĝentan plakajon al la direktoro de la valencia radiostacio, s-ro Vincento Beta.

Ĉeestis s-ino Mikaelino Malon, parolantino, s-ro Emanuelo Vidal, administranto de la radiostacio, kaj d-ro Rafaelo Herrero, eksprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio kaj redaktoro de la programo "Micrófono Esperantista" de preskaŭ 20 jaroj.

Ĉiusemajne, la Esperanta programo informas, instruas kaj disvastigas Esperanton, en orienta Hispanujo, kio signifas fortan subtenon al la disvolviĝo de Esperanto.

En tiu okazo, la direktoro de la radiostacio reliefigis, ke "Micrófono Esperantista" estas la plej



daŭra kaj meritoplana sekcio de "La Voz de Levante", pro sia malavara kontribuo al la klerigo kaj al la morala sinteno de la popoloj.

La prezidanto de la Valencia Grupo de Esperanto regalis la oficistaron de la radiostacio per cigaroj kaj dolĉaĵoj, tiel dankante ilin pro la daŭra amikeca sinteno en iliaj rilatoj kun la Esperanta sekcio.

La loka gazetaro raportis tiun eventon, kaj tio konsistigis plian reklamon por Esperanto en la valencia regiono.

La programo estas nun dissendata dimanĉe de 22.45 ĝis 23.00 GMT per ondo 278 m. (1079 kcs). Nur loka aŭskultebleco.



Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16e, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

KALENDARO

Majo - Septembro

Majo

- 15-19 62a Franca Kong., 2a Renkontiĝo Franca-Monaka-Itala, Monte-Carlo, Monako
16-18 Sveda Kongreso, Jönköping
16-22 22a Int. Fervojista Kong., Rimini, Ita.
22-25 54a Brita Kongreso, Harrogate

Junio

- 21 Limdato por aliĝo al UK Vieno
26-28 12a Kanada Kongreso, Ottawa
27-29 2a Franca-Hispana Renkontiĝo, Jaca, His.
28-12/7 Seminario por kursgvidantoj, Grésillon

Julio

- 1-14 Studenta Scienca Tendaro, Bydgoszcz, Pol.
1-14 Int. Ferioj por Popollernejanoj, Bydgoszcz
1-31/8 Int. Ferio-Centro Volparija, Jug.
3-6 2a Kultura Festivalo, Opava, Ĉeĥ.
4-7 19a Jugoslavia Kong., Niŝ
4-11 1a Nordia Seminario, Wendelsberg, Sve.
4-12 Esperantista Renkontiĝo, Podebrady, Ĉeĥ.
5-11 8a Somera E-Universitato, Gyula, Hung.
10-30 Int. Junulara Renkontiĝo, apud Latino, Ita.
10-31 Int. Labortendaro, apud Romo, Ita.
12-26 Kulturaj kaj Turismaj Ferioj, Grésillon
13-23 Int. E-Seminario, Szeged, Hungarujo
15-25 Int. Turista Renkontiĝo, Szeged, Hun.
17-30 2a Int. Balatona E-Ferio, Balaton, Hun.
18-23 30a Hispana Kong., Mieres
18-28 Int. Renkontiĝo Naturamika, Abaliget, Hun.
18-31 Int. E-Ferioj por Mezlernejanoj, Torun, Pol.
19-26 Int. Feriaj Kursoj, Helsingör, Dan.
22-26 Usona Kongreso, San Francisco
22-25 Int. Kulturfestivalo, Bialystok, Pol.
24-31 Komuna Kong. de Kristanoj kaj Katolikoj, Brno, Ĉeĥ.
25-26 57a Japana Kong., Osaka
25-30 Int. Konf. pri Komensky, Prerov, Ĉeĥ.
25-31 6a Int. Seminario, Torun, Pol.
25-31 43a SAT-Kong., Augsburg, Ger.
26-9/8 Esperantaj Studoj, Grésillon, Fra.
28-31 Instruista Int. Konf., Maribor, Jug.
29-1/8 Antaŭkongreso de 55a UK, Bratislava, Ĉeĥ.

Aŭgusto

- 1-7 Int. Feriosemajno, Kniebis, Ger.
1-8 55a Universala Kongreso, Vieno;
11a Int. Infankongreseto, Vieno, Aŭstrujo
3-22 3a Int. E-kurso, Pamporovo, Bul.
8-9 3a Ornitologia Semajnofino, Rust, Aŭstrujo
8-10 Postkongreso de 55a UK, Linz, Aŭstrujo
8-15 26a Int. Junulara Kong., Graz, Aŭstrujo
8-15 Postkongresa ekskurso al Bad Hofgastein, Aŭstrujo
9-11 Postkongresa ekskurso al Praha, Ĉeĥ.
9-11 Postkongresa ekskurso al Budapeŝto, Hun.
9-14 Postkongresa rondvojaĝo tra Aŭstrujo
9-30 Kulturaj Semajnoj en Grésillon
17-30 Int. Studenta Laborbrigado, Torun, Pol.
23-29 12a Eŭropa Feriosemajno, Gwatt, Svi.
23-29 Seminario por gvidantoj de TEJO, Ned.
30 Landa E-Renkontiĝo, Covasna, Rum.

Septembro

- 18-1/10 6a Int. Ferio, Miedzygôrze, Pol.
19-26 41a Itala Kong., sur ŝipo "Caribia"

OFICIALA INF

N-ro 434, 1 aprilo 1970

NOVAJ LANDAJ O

NOVAJ ĈEF-DELEGITOJ

Belgujo: La ĉef-delegito de UEA por Belgujo, s-ro Fr. Schellekens, devis forlasi la oficon post sep jaroj da laboro por la Asocio, pro kreskantaj taskoj profesiaj. Ni esprimas sinceran dankon al s-ro Schellekens pro la multjara kunlaboro. Kiel novan ĈD, Belga Esperanto-Federacio nomis f-inon Andrée Orsolini, rue Paul Pastur 6, B 6000 Charleroi (pĉk 20.16.40; tel. 07/ 31.02.46).

Italujo: Itala Esperanto-Federacio decidis nomi kiel novan ĉef-delegiton de UEA por Italujo d-ro Mario Dazzini. D-ro Dazzini estas delegito en Massa (via Palestro 36) kaj aktivulo precipe sur la lerneja kampo. Li anstataŭas s-ro Luigi Minnaja, kiu antaŭ nelonge demetis la oficon pro malsano.

NOVA PERANTO EN GREKUJO

Post sesjara servado kiel Peranto de UEA por Grekujo retiriĝis el la ofico s-ro Sokratis Sakellarpoulos. Kiel novan Peranton la direktoro de la C.O. nomis s-ro Kimon G. Eliopoulos, Elefteriu Venizelu 130, Nea Smirni (Ateno), Grekujo. Telefono: 931.214. Al s-ro Sakellarpoulos ni varme dankas pro la pasintaj servoj, kaj al s-ro Eliopoulos ni deziras multan sukceson por la kreskigo de UEA kaj de la tuta movado en Grekujo.

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO

En la 10a de marto 1970 okazis elektoj por renovigo de la triono de la Akademio. Vakis, pro morto aŭ eksiĝo, 3 personoj. El la elirantaj membroj ĉiuj estis reelektitaj, escepte de s-ro Cseh, kiu de ses jaroj ne plu partoprenis en la laboroj de la Akademio. Estis do elektitaj 4 novaj akademianoj: d-ro I. Chiussi, la tradukinto de "La Nobla Korano"; d-ro G. Mattos, la konata brazila verkisto; d-ro V. Sadler, la redaktoro de "Esperanto" kaj de "La Monda Lingvo-Problemo"; kaj mag. J. Wells, la aŭtoro de la plej moderna vortaro angla-Esperanta kaj Esperanta-angla.

La aĉetontoj de la "Aktoj de la Akademio" (5,05 gld.) trovos en tiu broŝuro la statuton de la Akademio, adresojn kaj biografiajn indikojn de ĝiaj membroj, kaj, sub formo de enmetita kromfolio, ĝian nunan konsiston post la ĵusa balotado.

La Prezidanto de la Akademio,
G. Waringhien

(FICULOJ



L. Minnaja,
ĝisnuna Ĉefdelegito
por Italujo



M. Dazzini,
nova
Ĉefdelegito
por Italujo

NOVA LANDA ASOCIO DE UEA

Sud-afrika Esperanto-Asocio, fondita en 1962, ĵus aliĝis al UEA. Per skriba voĉdono (42 por, 2 kontraŭ, 7 sindetenoj) akceptis ĝin la Komitato de UEA. SEA estas la 31a aliĝinta Landa Asocio de UEA, kaj samtempe la tria en Afriko. La aliaj estas tiuj de Kongo (Dem. Respubliko) kaj Malagasa Respubliko. Laŭ la Statuto de SEA, povas aliĝi al ĝi ĉiu persono, kiu simpatias al ĝiaj celoj kaj pagas la kotizon.

"POR LA PRESEJO"

De post la redakto de la aprila numero, la sumo donacita de la membroj por parte kovri la kostojn de la nova oficeja maŝinaro kreskis de 5 400 al 6 900 guldenoj. La komposto-maŝino kaj fotografilo jam regule funkcias. Dankon!

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de julio neniun membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Argentino: Antonio Tuduri (FD), Adroque. **Brazilo:** Leonidas Silva (FD), Curitiba. **Ĉeĥoslovakio:** Ján Göldrich (FD), Handlová. **Finnlando:** Erik Gadd (D), Imatra; Marjatta Linjama (D), Keljonkangas. **Nederlando:** Wilhelmina Smit (D), Amersfoort. **Svedujo:** Nils-Erik Kristoferson (FD), Stockholm. **Usono:** Mark Mandel (JD), New York; Herbert Corlett, Sebastopol; Sara Estling (FD), Walla Walla.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1969)

Argentino: Rosario (JD). **Brazilo:** Rio de Janeiro (FD farmacio). **Britujo:** Canterbury; Denholme; Newcastle upon Tyne; Tonbridge. **Francujo:** Tain-l'Hermitage. **Hispanujo:** Valladolid (D). **Italujo:** Brescia; Verbania Intra. **Nederlando:** Arnhem (FD instruado). **Usono:** Fresno (FD).

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Pilling, F-ino F., Poulton-le-Fylde, Britujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1970

171 Camarasa, s-ro E., Argentino. 172 Crabtree, s-ro E., Britujo. 173 Amorim, s-ro N.; 174 Araujo, s-ro G.; 175 Franco, s-ro L.; 176 Pessoa, s-ro F.; 177 Pinto, s-ro J.; 178 Varanda, s-ro J., Brazilo. 179 Beau, prof. J.; 180 Bodson, s-ro C.; 181 Boiton, f-ino M. T., 182 Cellier, s-ro P., Francujo. 183 Castelltort, s-ro J.; 184 Olivan, s-ro S.; 185 Perarnau, s-ro J., Hispanujo. 186 Waksman, s-ino H., Israelo. 187 Riva, f-ino M.; 188 Viti, s-ro G.; Italujo. 189 Breddels, s-ro A.; 190 Luyke, s-ro H., Nederlando. 191 Armanis, s-ro A., Norvegujo. 192 Andersson, s-ro B.; 193 Andersson, s-ro I.; 194 Bengtsson, s-ro K.; 195 Blid, s-ro A.; 196 Edvardsson, s-ino S.; 197 Ericson, s-ro A.; 198 Eriks-son, s-ro A.; 199 Fejde, f-ino G.; 200 Fejde, s-ro M.; 201 Gävle Esperantoförening; 202 Leijder, s-ro Hj.; 203 Lind, f-ino E.; 204 Mattsson, s-ro G.; 205 Mellberg, f-ino G.; 206 Näsholm, s-ro A.; 207 Nylin, s-ino G.; 208 Olsson, f-ino A.; 209 Olsson, s-ro O.; 210 Persson, s-ro O. 211 Schuldenfrei, s-ro E.; 212 Stridell, s-ro K., Svedujo. 213 Davis, s-ro R.; 214 d'Estries, s-ino M.; 215 Spant, s-ro G.; 216 Zafrans, s-ro I., Usono.

DONACOJ (Gld.)

Fondajo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Germanujo: Schmidt, s-ro Georg, 4,68. Nederlando: Muller, s-ro J. L., 26,69.

Fondajo Oficeja Ilaro: (ĉiuj donacoj estas por la presejo): Britujo: Markarian, s-ro R., 25,73; Parker, s-ro F., 15,67; Rytjkov, s-ro N., 25,89; Tharme, f-ino H., 10,70. Danlando: Bagger, s-ro P. V., 150,—. Finnlando: Esperanto-Klubo de Helsinki, 15,—. Germanujo: Erhard, s-ino, 19,50; Heide, s-ro W., 9,—; Schlüter, d-ro, 9,75; Sonnabend, s-ro H., 48,39. Hispanujo: Gironés, s-ro J., 5,08; Molera, s-ro R., 101,60; Monleón, s-ro M., 4,53; Olivan, s-ro S., 5,08; Perarnau, s-ro J., 6,60; Simpkins, s-ro W. L., 85,76; Villà, s-ro F., 5,08. Nederlando: Bossong, s-ro R., 10,—; Brouwer, f-ino K., 10,—; Kalis, f-ino N. J. M., 25,—; Kilmer, s-ino E., 25,—; Kos, s-ro K., 100,—; Sliggers, s-ro B. C., 15,—; Wensing, s-ro E. L. M., 300,—. Svedujo: Möllestad, s-ro S., 10,42; Nilsson, f-ino A. H. L., 69,69. Usono: Schulze, s-ro W. H., 363,93.

Ĝenerala kaso: Francujo: Boulet, s-ro J.-P., 3,—. Usono: Kent Jones, s-ro R., 6,11.

Patrono A de TEJO: Argentino: Camarasa, s-ro A. R. Germanujo: Sonnabend, s-ro H. Italujo: Bes-sone, f-ino A.; Clerici, s-ro R.; De Lorenzi, f-ino C.; De Manzini, s-ro C. Jugoslavio: Zlatnar, d-ro P. Nederlando: Wensing, s-ro E. L. M. Svedujo: Olsson, s-ro O.

Por TEJO: Danlando: Bagger, s-ro P. V., 150,—. Svedujo, Sundsvall Esperanto-Klubo, 31,25.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

Anoncetoj

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.



KORESPONDEMULOJ !

Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

65 grupanoj de 11- ĝis 70-jaraj volonte koresponde kontaktiĝos kun la vasta mondo. Skribu al Esperanto, Poštovní schránka 25, Melník, Ĉeĥoslovakio.

Survoje al Helsingør ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu la semajnon (11.-18.7.70) en la feria centro Kosmos en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela dana naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK-2000 Kopenhago F., Danlando.

Ĉu vi libertempos en Ĉeĥoslovakujo? Petu unue informojn ĉe la Turisma Servo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Redaktoro korespondos. Mariusz Dastych, Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio, Pollando.

Filatelistoj! Ni proponas al vi poŝtmarkojn je duona prezo! Vidu la artikolojn en "Esperanto", 1969, p. 89 (majo) kaj 1970, p. 11 (januaro).

Veteranaj esperantistoj: Kiu povos vendi al mi numerojn de "La Esperantisto" (Nürnberg-a eldono), "Lingvo Internacia" (Upsala, Lulea kaj Szekszárd-aj eldonoj), "La Ondo de Esperanto" (rusa) kaj "La Bela Mondo"? Ramón Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Mi deziras aĉeti semojn de la planto "Calceolaria Darwinii". Tiu planto kreskas en Patagonio (Suda Argentino). Se vi havas tiajn semojn, bonvolu al Haldan N. Agnar, 6519 Sprecht Ave., Bell Gardens, Ca. 90201, Usono.

S-ro Hristo Dolčinkov, kursgvidanto, serĉas korespondantojn por siaj 40 gekursanoj, pleje geinstruistoj (20-40 jaraj). Respondo garantiita! Komence de junio la grupo organizos letervesperon. Str. Dim. Ivanov 7, V. Tirnovo, Bulgarujo.

Kongano finis elementan kurson de Esperanto en 1966 sed poste ne plu havas instruiston. Serĉas rimedojn por perfektigi en la lingvo eksterlande. Interesitoj skribu al: Ngingi Louis, radio-teknikisto, B.P. 3171, Kalina-Kinshasa, Dem. Resp. Kongo.

Francisko Simonnet de pluraj, al kiuj li devis skribi, aŭ kun kiuj li devis iel kunlabori, petas pardono pro multa silento pasinta, kaŭzita grandparte de malbona sanstato kaj premo de profesiaj urĝaĵoj, **ankaŭ de perdo de iuj adresoj** (eĉ de kun-kongresintoj). Li esperas de nun iompostiome religiĝi. Adresoj: poluja ne plu validas, sed nur francuja (16, rue Dohis, F-94-Vincennes) aŭ tiuj en Tel-Aviv (Rembrandt-str. 34: **ĉi tiu ne por pakajoj, gazetoj k.s.;** aŭ: Franca sekcio, Universitato, Ramat-Aviv; aŭ: Franca ambasadorejo, Kulturaĵservoj, Hajarkonstr. 111). **Ĉi tio ne estas peto por novaj korespondantoj.**

Pri "The Gaelic League" ekster Irlando, serĉas informojn kaj kontaktadresojn F. Simonnet (kies adreso troviĝas supre).

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA, (2427 Padstow Cres., Clarkson, Ont., Kanado), povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi, kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

"Mondo kaj koro" rehabebla. Mendebla kontraŭ dek respondkuponoj ĉe Reinhard Haupenthal, Kantstr. 50, D-6602 Dudweiler.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Historio ne ripetiĝas, kaj tamen vi povas salte veni al Finnlando — kongreslando 1969! 145-paĝa Kongresa Libro de Helsinko fariĝos interesa dokumento en via librokolekto. Reduktita prezo 1,80 gld. aŭ 4 int. rpk. (ink. sendokostojn). Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

NE KOSTAS MULTE

informadi la publikon pri Esperanto en diskreta kaj efika maniero. Zorgu, ke ankaŭ en la telefonlibro de via urbo aperu telefonnumeroj ĉe la vorto "Esperanto"! Petu informojn ĉe la lokaj poŝtaj instancoj.

pelin Veikko ja Sirkka	
Jääränmaant. 10	302632
Esperanto-delegitoj en Turku	10251
18749 19307 26591 85232 86004 89506	
304271 354567 355649 358023 390710	
Espilä Eino raudtoitt. Stålmarmink. 27 G	355186
Espola Henry tarkast. Tuomikuja 4	362430
Espola Impi rva Kanslerint. 1	301254
Espola Pertti ekon. Iltatähdent. 8	305

Tian faskon da telefon-numeroj prezentas al turistoj kaj al interesiĝantoj pri Esperanto la telefonlibro de Turku (Finnlando).

BINDITA JARKOLEKTO

de la revuo "Esperanto" (1969)

Bela volumo bindita en verda tolo kun ora surpriso.

192 + 44 paĝoj, ĉ. 180 ilustraĵoj.

Por Membroj-Abonantoj 1969: 7 gld.

Por aliaj mendantoj: 14 gld.

Por jarkolektoj ne necesas pagi sendokostojn.

(En Nederlando bv. aldoni 4% pro la spez-imposto.)

HELPU VIAN ASOCION!

Kiel konate, s-ro P. Zacho el Kopenhago organizas la kolektadon kaj disvendon de poŝtmarkoj profite al la kaso de UEA.

Kongresanoj! Kolektu la uzitajn poŝtmarkojn de viaj korespondaĵoj kaj kunportu ilin al Vieno por transdono al la giĉeto de UEA! Per tio vi donas gravan financon subtenon al via Asocio!

2-a ESPERANTISTA KULTURA FESTIVALO

3-6 julio 1970, Opava, Ĉeĥoslovakio

OMAGE AL 200-JARA DATREVENO DE L. VAN BEETHOVEN (1770-1827)

Ĉefaj programeroj:

Koncerto el verkoj de Beethoven
Teatra prezentado
Ekspozicio de artaĵoj
Trarigardo de memorindaĵoj en Opava kaj en Hradec
Tuttaga ekskurso (Opava - Fulnek - Nový Jičín - Štramberk - Koprivnice - Příbor - Opava)

Aliĝu per UEA. Aliĝkotizo 10 gld. (por ne-ĉeĥoj).

Pli detalan programon, aliĝilon, prospekton k.s. oni petu ĉe la organizantoj: Esperanto-rondeto Ostroj, p.k. 28, Opava. Loĝadon oni garantias nur al aliĝintoj antaŭ 30 majo 1970.

(Por loĝado kaj la ekskurso oni devas interkonsenti rekte kun la organizantoj.)

Opava

urbo riĉa je arbaroj kaj moderaĵoj

Fondita en 1966

LA LINGUA INTERNAZIONALE

Iama "L'Araldo Esperantista" (1926) **ESPERANTO**

Fondinto-Redaktoro: Corrado Cerri-Calzoni

Itallingva poresperanta gazeto.

Formato cm. 32 x 44. 4-paĝa. 5-kolona. Papero flavkolora. Verda inko. Presita. Ilustrita. Trimonata. Absolute neŭtrala.

Ne estas fiksita abonkotizo. Ĝi estas sendata al tiuj personoj itallingvoparolantaj, kiuj faras oferdonon (valoron de unu paketo da cigaredoj) kaj interesiĝas pri la internacilingva problemo. Faciligu la atingon de alta nombro da aŭtoritatuloj kaj lernejestroj en ĉiuj lokoj.

Klopodu regajni perditajn samideanojn!

Ekzistas multaj dekmiloj da itallingvoparolantoj, kiuj ne ricevas plu novaĵojn pri la esperanto-vivo. Klopodu regajni ilin al la esperanto-movado per tre malalta elspezo (it. L. 250).

**Adresu: La Lingua Internazionale ESPERANTO,
(Direttore: Corrado Cerri)
Casella Postale 159
I-13051 BIELLA (Vc)**

paĝo: Corrado Cerri, n.5-742, I-13051 Biella (VC).



GLUSTELO

Gluebla sur aŭtomobiloj ktp.
Formato: 12 x 9 cm.
Prezo: nur 0,90 gld.

Mendu ĉe Libroservo de UEA



Universala Esperanta Stenografio. Lernolibro por memlernado aperis sub la aŭspicioj de UEA kaj de EKI.

(prezo: gld. 17.75 = 71 steloj).
Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich.

En 1970 aperos:

ABZ de Amo

de la danaj verkistoj Inge & Sten Hegeler.
La plej vendata libro de sia speco en Danlando — enciklopedio pri la kunvivo de plenkreskaj homoj — verkita por plenkreskaj homoj. Petu senpagan prospekton ĉe la eldonejo. Reduktita prezo je antaŭmendo.



Eldonejo Torben Kehlet, Ystadvej 11,
DK 2850 Naerum, Danlando

La Nobla Korano

2-a eldono



Monumenta verko en la Esperanto-movado

Serio Oriento-Okcidento n-ro 10

700-paĝa, lukse bindita eldono, presita sur flaveca papero
Tradukita de prof. d-ro Italo Chiussi,
membro de la Akademio de Esperanto.


Antaŭparolo de lia moŝto Zafrulla Khan,
prezidanto de la Internacia Kortumo.
Prezo 35 ned. gld. + 10 % da sendokostoj

Mendu ĉe la eldonejo:



Eldonejo Torben Kehlet, Ystadvej 11,
DK 2850 Naerum, Danlando

Nederlanda pĉk. 1806731, germana pĉk. Hamburg 36 17, dana pĉk. 7 95 58.



- Invito al Mediteranea Maro -

41-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

19-26 septembro 1970

sur granda ŝipo "CARIBIA"

Kotizoj por 7-taga restado sur la ŝipo (en it. liroj) ĝis 25/5/70 post 25/5/70

La eksterlandaj esperantistoj, por kiuj aliĝkotizo estas senpaga, estos aparte bonvenaj en tiu-ĉi unika kongreso, kies laboroj disvolviĝos en plaĉa kaj komforta medio, dum la ŝipo veturos de GENOVA al CANNES - BARCELONA - PALMA DE MAJORCA - BIZERTE (TUNISIO) - PALERMO - CAPRI (NAPOLI), kaj revenos al Genova.

Kategorio "Gejunuloj" (4-lita kajuto, ferdeko B)		
Partoprenantoj ĝis 25 jaroj	48.000	50.000
Partoprenantoj inter 25 ĝis 33 jaroj	53.000	57.000
Kategorio "Turismo"		
4-lita kajuto (ferdeko B)	63.000	67.000
4 lita kajuto (ferdekoj A kaj Restoracio)	69.000	73.000
2-lita kajuto	86.000	90.000
2-lita kajuto (4-lita, sed okupata de 2 personoj)	99.000 (*)	103.000 (*)
1-lita kajuto (2-lita, sed okupata de 1 persono)	125.000	129.000
(*) Eventuala tria persono pagas	63.000	67.000
Kategorio "Komforto"		
4-lita kajuto ekstera	109.000	113.000
2-lita kajuto interna	109.000	113.000
2-lita kajuto ekstera	122.000	126.000
2-lita kajuto ekstera kun banejo aŭ duŝo	150.000	154.000
1-lita kajuto ekstera kun banejo aŭ duŝo	166.00	170.000

Al tiuj sumoj aldonu po 6.000 it. lirojn kiel haven-impostojn. Petu detalan programon kaj informojn al: "TORINA Esperanto-Grupo, 41-a Itala Kongreso de Esperanto - Casella Postale n° 198 - Torino (Italujo)